

Bulgaria

ESPERANTISTO



E N H A V O

* * 30 jarojn socialisma kulturo	1
R. S. Esperanto-Societo en Preslav	2
Atanas D. Atanasov — ADA. Simeon Petkov	3
C. Todorov, Iv. Smokov. Vivo-ekzemplo	6
Atanas Gaev. Revolucia festo en Asenovgrad	7
Manol Ĉolev. Cerebro de esperantistoj-herooj	7
* * Solidareco kun la batalanta ĉilia popolo	8
Ilija Ivanov. Esperantista renkontiĝo en Borima	8
Cvĵatko Todorov. Fruktoĉona kunlaborado	9
Minko Conkovski. Grava Esperantista akiraĵo — propra domo en Pazarĝik	10
* * Intervjuo kun P. Arnaudov	10
P. A. Gasto el GFR	12
Vladimir Ĵelev. Asen Grigorov — gasto al la blinduloj en Plovdiv	12
B. Kavalĝiev. Ekskurso al groto	12
Dimitar Petkov. Renkontiĝo kun francaj esperantistoj	12
Vasja Petrova, doc. Georgi Dimov. Nia gastado en GDR	13
J. Termes. Petĉi en Bulgario	14
K. B. Aŭstra-bulgara vespero en Vieno	14
* * El letero de franca esperantistino	14
A. Ĥarkovskij. La kajero de Apolĉno Skaljskij	15
Ĥrima. Ludvig Renn	17
* * Agado de Pola Esperanto-Asocio	18
Petr Stoilov - Kaŝilski. Plovdiv ribelis	20
Veselin Ĥanĉev. Al unu pafito	22
Mladen Isaev. Al la montopinto	23
Rajna Arnaudova. Jubilea	23
Georgi Ĝagarov. Partia kanto	25
Vatju Rakovski. Malproksime	25
Ljuba Bojaĝieva. Henk	25
Ĥrima. Septembra balado	27
Ljuba Ĵekova. Fatima	28
Venceslav Konstantinov. La ĝojo de la vivo	29
Ivan Rudnikov. Altaroj	30
Nevena Nedelĉeva. Letero	30
Simeon Ĉirpanliev. Fago kaj fungoj	31
Ivan Vazov. La lumturo	32
Dobri Ĵotev. Kanario	32
Ljuba Bojaĝieva. Pasera kanto.	32
Marin Baĉev. Ĉu vi amas min ?	32
Petro Stoĉkov. Kruĉvortenigmo	III
* * Tra la gazetaro	III
* * Deziras korespondi	IV

Sur la kovrilpaĝo :

Antaŭ la nova Esperanto-domo en Pazarĝik. Momento de la inaŭguro *

Abonkotozito : jara — 1,40 levoj. Por eksterlando — 3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dola-roj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Ru-manio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta nu-mero — 0,14 lv.

Reklamtarifo : 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anonĉoj : 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoĉoj — publikigataj senpage.

**30 JAROJN SOCIALISMA KULTURO**

La bulgara socialisma kulturo — daŭrigo de la demokratia kaj progresema miljara kulturo de nia popolo — jam fariĝas 30-jaraĝa. Ĝi renkontas tiun ĉi maturan jariĝon kiel integra parto de la socialisma nuntempo de Bulgario, kiu ankaŭ 30-jariĝas (1944 — 1974).

La alta nivelo estas karakteriza por ĉiuj sferoj de la kulturo en nia lando — beletristiko, dramo, kino, muziko, pentrarto ktp.

Nuntempa Bulgario havas verkistojn, muzikistojn, artistojn kaj pentristojn, kiuj estas konataj kaj estimataj malproksime de ĝiaj limoj. Kaj pri la rilato de la popolo al la kulturo eble plej elokvente parolas la ciferoj mem: 83% de la loĝantaro super 18-jara aĝo legas belartan literaturon, 75% spektas kinofilmojn, 79% — teatrajn spektaklojn, pli ol 95% ĉiutage aŭskultas muzikon, 60% vizitas artajn ekspoziciojn. Tiu premo de la ĉiutaga intereso al la bulgara kaj eksterlanda kulturo naskas malkovradon de novaj teatroj, artgalerioj, bibliotekoj, muzikistitutoj kaj kinejoj en la tuta lando.

Nun en Bulgario funkcias 53 ŝtataj teatroj (en 1939 — nur 13). Por la sama periodo la nombro de la kinejoj kreskis de 155 al 3600. La „legejoj“ — tiu tradicia bulgara formo de popola biblioteko kiel centro de klerigo kaj amatora art-agado — kreskis de 2600 al 4300, la bibliotekoj — de 4400 — al 10 600. Estas eldonitaj jare 4100 titoloj en pli ol 42 milionoj da ekzempleroj (6,5 milionoj antaŭ la liberiĝo de la lando). Nun aperatas pli ol 900 revuoj kaj 700 gazetoj en komuna eldonkvanto pli ol 900 milionoj da ekzempleroj (antaŭ la 9. IX. 1944 — 130 milionoj). Antaŭe en la lando funkciis 80 muzeoj — nun 170. Estis produktat' j jare 3-arcifilmoj, kiu cifero estas ligita kun tre malaltnivela kvalito, nun ĉ. 500 artaj kaj dokumentaj filmoj, kies artaj kaj sociaj kvalitoj estas pritaksataj ne nur de la bulgara, sed ankaŭ de alilanda publiko. . .

Nature, en tiu ĉi artikolo estas neeble citi ĉiujn nomojn de talentaj aŭtoroj, kiuj formas la bildon de la nuntempa bulgara socialisma kulturo. Tamen inter ili estas citindaj almenaŭ kelkaj plej elstaraj: el la verkistoj — Georgi Karaslavov, Dimitâr Talev, Dimitâr Dimov, Orlin Vasilev, Bogomil Rajnov, Andrej Guljaŝki, Jordan Radickov, Nikolaj Hajtov k. a.; el la poetoj — Veselin Andreev, Penju Penev, Pavel Matev, Georgi Ĝagarov, Valeri Petrov, Blaga Dimitrova, Stanka Penčeva k. a.; el la komponistoj — Petko Stajnov, Ljubomir Pipkov, Pančo Vl. digerov; la konataj en la tuta mondo kantistoj Nikolaj Gjaurov, Nikola Gjuzelev, Nikola Nikolov, Dimitâr Uzunov, Rajna Kabaivanska k. a.; el la artistoj — Konstantin Kisimov, Raĉko



Jabanĝiev, Apostol-Karamitev, Georgi Georgiev — Gec, Spas Gonev k. a., el la pentristoj — Ilija Beškov, Nikola Mirčev, Ilija Petrov, Boris Angeľuŝev ktp.

Sub la aŭspicio de la Komitato de Kulturo kaj Arto preskaŭ ĉiujare estas organizataj naciaj revuoj de la dramteatroj, de la simfoniorkestroj, de kantistoj kaj instrumentistoj. Krome — tutlanda festivalo de la amatora arto. En diversaj loĝlokoj estas organizata tuta aro da lokaj kulturaranĝoj, ekz. Sofiaj Muziksemajnoj, Varna Somero, La Ora Orfeo k. a. kun la partopreno de bulgaraj kaj eksterlandaj renomaj artistoj. Interesaj estas ankaŭ la regionaj kulturaranĝoj: Majaj Kulturfestoj en Smoljan, Literaturaj Vesperoj en Melnik, la Fajroj en Siiven, la Siringaj Festoj en Loveč k. a.

En Sovetunio kaj aliaj socialismaj landoj oni organizas „Tagojn de la Bulgara Kulturo“ en daŭro de unu aŭ pliaj semajnoj. En multaj landoj en ĉiuj kontinentoj (inkluzive en Latinameriko kaj Japanio) estas organizataj kinopanoramoj de la plej bonkvalitaj bulgaraj filmoj, kaj reciproke ĉe ni oni montras en daŭro de semajno vicojn da francaj, polaj, usonaj, anglaj k. a. filmoj. Tio prezentas interesan formon de reciproka kultura intersanĝo kun partopreno de dekmilionoj da spektantoj.

La florado de la bulgara kulturo estis evidenta ankaŭ en la alia granda ĝia branĉo — la scienco. Laŭ statistiko de UNESKO ĉiun kvinan jaron Bulgario duobligas sian sciencan potencialon kaj estas en la rango de la ŝtatoj, kiuj asignas plej multe da monrimedoj por la evoluigo de la scienco. En la lando funkcias 380 scienc-esploraj institutoj, 27 universitatoj kaj aliaj institutoj por supera klereco kaj entute 4700 lernejoj. La nombro de la sciencaj specialistoj atingis 15 000 kaj de la studentoj — 104 000 (antaŭ la revolucio — nur 7 superaj lernejoj kun entute 26 000 studentoj). Nur dum la jubilea jaro aperas 180 titoloj de scienc-esplora karaktero. La tuta aktiva loĝantaro estas legoscia kaj ĉiuj infanoj kaj junuloj lernas en diversgradaj lernejoj. La instruado estas tute senpaga.

La bulgaraj esperantistoj aktive partoprenas en la evoluigo de la kulturo. Specialan atenton meritas ilia agado por popularigo de la bulgara literaturo tra la tuta mondo: tradukoj en Esperanton de verkoj de la belletliteraturo (prozo kaj poezio), teatraj spektakloj, filmoj kun Esperanta teksto k. a.

Floradis la bulgara kulturo kaj arto dum 30 jaroj de socialisma Bulgario. Ni estas certaj: ĝi aligos al novaj suproj ĉiujare, ĉiutage, ĉiuhore.

ESPERANTO-SOCIETO EN PRESŁAV

La 14-an de majo ĉ. j. en la uzino por postaŭtomobilaj veturiloj en u. Preslav estis aranĝita ekspozicio de Esperanta literaturo kaj gazetaro. Ĝi estis malfermita per mallonga prelego de Rajna Stančeva je temo: „Esperanto serve de la scienco kaj la teknika progreso“.

Post la prelego la vicdirektoro de la uzino ing. Stiliĵan Stiliĵanov, malnova esperantisto, faris proponon pri fondo de E-societo en la uzino. La ĉeestantaro varme akceptis la proponon. La nova societo ricevis la nomon de la esperantisto-kontraŭfaŝisto Ivan Kāndev,

kruele mortigita de la faŝistoj antaŭ la policaĵo de Preslav.

La novelektita estraro konsistas el: prezidanto ing. St. Stiliĵanov, sekretario Rajna Stančeva, kasisto Kinčo Stojčev, kuituramasa agado Radka Palazova kaj kursa laboro Penka Koleva.

La nombro de membroj-fondintoj estis 24.

Tuj post la kunveno komenciĝis Esperanto-kurso, gvidata de Rajna Stančeva.

R. S.



SIMEON PETKOV

La bulgara Esperanto-movado perdis ankoraŭ unu valoran veteranon el la malnova generacio. La 17-an de junio en Sofio forpasis Simeon Petkov —



ne nur veterano laŭ aĝo kaj esperantisteco, sed ankaŭ unu el la meritaj pioniroj, kiuj desegnis la vojon de la enlanda E-movado.

Simeon Petkov estas naskita en 1886. Li forpasis kvar tagojn post sia 88-a naskiĝtago.¹ Frue en sia juneco li ellernis la Internacian Lingvon kaj restis ĝis sia lasta tago ĝia fidela adepto, profunde kaj neŝanceleble konvinkita pri la praveco de la solvo de la internacilingva problemo per ĝi. En la periodo de sia studenteco la inteligenta junulo, strebanta al ĉiam pli alta spirita kulturo, trovas areton de bonaj kamaradoj, kiuj havas samajn idealojn; tio es-

tas junuloj, kiuj deziras labori sur la literatura kampo. Ili fondas amikan rondon nomitan tiam bulgarlingve „Pārva Kračka“ (Unua paŝo) kaj komencis eldoni modestan, mane skribatan kaj litografie multobligatan gazeton, en kiu estis publikigataj iliaj unuaj literaturaj provoj. Mi havis okazon jam tiam legi la gazeton. Georgi Karastojanov, kiu donis al mi la unuajn lecionojn de Esperanto en 1904, estis membro de la rondo, pruntis al mi regule multajn librojn kaj inter ili ankaŭ la gazeton de la amika rondo. En ĝi mi tralegis, interalie, humuran rakonton ĉe rusa verkisto, sub kiu estis skribita (en bulgara lingvo) „Tradukita el Esperanto“. Krome, ĉiu numero de la gazeto entenis lecionon de Esperanto. Do, Esperanto estis penetrinta en la Rondon — ĉu per unuopulo, ĉu per pluraj membroj, tion mi ne scias. Supozeble, ĝuste Simeon Petkov enportis en ĝin la fajron, ĉar el la enhavo de la numeroj mi povis ekkapti lian rolon de aktiva gvidanto. Fine, la tuta amika rondo fariĝis esperantista kaj en sia dua jarkolekto la gazeto aperis nur en Esperanto, jam kun Esperanta titolo — „Unua Paŝo“. En la Rondo partoprenis, interalie, Georgi P. Zografov (subskribante siajn verketojn per pseŭdonimo Gopozo), Petr Spasov (poste juĝisto en Jambol), Ĥristo Rjaĥovski.

En la sekvaj jaroj la Rondo pillarigis sian aktivecon jam sur la tereno de la socia vivo, kun ambicio labori por disvastigi la Internacian Lingvon kaj unuigi la bulgarajn esperantistojn en komunajn landan organizojn. Tio estis en periodo de malfortiĝo de la Movado, post la morto de la komence tre vigla klubo „Stelo“ en Plovdiv. Jen kion mi skribis en miaj „Rememoroj de Esperantisto“: „Venis paŭzo. Post kelka tempo ekĝermis samtempe pli forta mo-

¹ En la Jarlibro ĉe UEA, 1973 parto II, pĝ. 142 neĝuste estas montrita naskiĝjaro 1888 kaj kredeble la jaro de esperantistigo 1898.

vado en Sofio kaj en Târnovo. Nun laborantaj estas novaj personoj — la dua generacio. En Sofio unu literaturama rondo de amikoj... Kiel teoriulo de la movado distingigas Simeon Petkov... Tiu ĉi rondo kunvokis kongreson en Sofio en 1906 (7-an de oktobro) por fondi tutlandan esperantistan organizaĵon. Oni fondis tian kaj decidis eldoni organon — la gazeto „Bulgara Esperantisto“... Paralele kun la agado en Sofia rondo, en Târnovo maturiĝas esperantista generacio. Tie la Movado ekĝermis frue — ĉirkaŭ 1899—1900. En 1900 en Târnovo revenis el Ruslando... Hristo Haralambiev Li ekagis energie, farigis animo de la loka grupo „Lumo“... Ili (la membroj de „Lumo“) intencis altiri ĉiujn bulgarajn esperantistojn kaj organizi ilin kun centro Târnovo. Aperis antagonismo inter la sofiaj kaj târnovaj agantoj. La unuaj kulpigis la duajn, ke ili montras separemon, ke ili dividas la fortojn de la Movado, ke ili ne laboras por la unueco kaj plifortigo de la ĝenerala organizaĵo... Krome inter la konceptoj de la du grupoj da agantoj estis diferenco:... Sofio propagandis prefere intelektan okupon pri socia kaj scienca problemo, Târnovo aspiris organizi grupojn kun bruoj, standardoj, muziko, kantoj, jarfestoj — movado amasa... Kompreneble, severa kritikismo en tiu frua epoko... ne povis populariĝi kaj alligi la provincon al Sofio. La Sofia rondo ĉesis spiri en 1907. En la sama jaro la Târnova grupo „Lumo“ kunvokis en Târnovo kongreson. La kongreso fondis „Bulgaran Esperantistan Ligon“...

La Movado en la lando daŭris plu, sed la partopreno de Sofio ne estis sentata ĝis 1903, kiam ĝi revekigis kaj komencis viglan laboron, kiu daŭras ĝis nun.

Mi mem eniris en kontakton kun la agintoj de la antaŭaj jaroj — speciale kun Simeon Petkov kaj Georgi Nikolov. La lastan mi vizitadis tre ofte.

Sed ĉirkaŭ 1911 en la landa Movado sentiĝis laceco, venis dekadenco, iuj lokaj grupoj malviglis, aliaj mortis. Nur Sofio restis aktiva, kun impulsa vivo. La sofiaj esperantistoj, organizitaj en urba Espevanto-societo kaj en tre aktiva studenta esperantista grupo, inklinis al la konceptoj de agintoj de la „Unua Paŝo“. Por revivigi la Movadon ili proponis reorganizon de la Bulgara Esperantista Ligo en landan centralizitan „Bulgara Esperantista Societo“, kiu post unu jaro, en 1912, havis sian kongreson; la kongreso elektis kiel prezidanton Simeon Petkov kaj kiel vicprezidanton lian malnovan amikon Georgi Nikolov. Miaj penoj altiri al aktiva laboro la agintojn de la dua generacio kroniĝis per sukceso. Ni komencis kun novaj fortoj, streboj, ambicio... Ekzistis premisoj por vigla, serioza kaj stabila Movado. Sed, ekestintaj jaroj de militoj paralizis la kulturen vivon kaj la laboron por Esperanto dum pli ol 6—7 jaroj, dum kiuj la Movado preskaŭ plene letargiis, tamen ne mortis. Apenaŭ en 1919 ĉirkaŭ la prezidanto Simeon Petkov grupigis la malnovaj aktivuloj (pri tio legu mian artikolon „La junaj jaroj de Bulgara Esperantisto“ en „Bulgara Esperantisto“, 1969, n-ro 6, pĝ. 7). Per iliaj penoj la landa Movado revekigis kaj denove ekpaŝis al sukcesoj. La decidita en 1912 eldonado de „Bulgara Esperantisto“ nun ricevis realigon sub la redakto de Simeon Petkov.

En la bulgara socia vivo Simeon Petkov ĝuis renomon de elstara klera advokato. Dum multaj jaroj li estis regule elektata prezidanto de la Supera Advokata Konsilio. Ĝis la lastaj tagoj de sia vivo li partoprenis konsultajn kunvenojn por trakti komplikajn jurajn demandojn. Kaj ĉiam liaj klarigoj kaj konkludoj estis aprezataj kiel plej valora helpo.

En 1921 unu lia artikolo pri la Internacia Lingvo, aperinta en jura revuo, konvertis la eminentan profesoron de



Estimataj kaj karaj gesamideanoj!

La batalo por venko kaj triumfo de iu prava afero estas nobla homa faro. La internacia lingvo Esperanto, valora kreaĵo de la granda Ludoviko Zamenhof, servas en la batalo por kompreniĝo kaj paco inter la popoloj. En ĉiuj kontinentoj de la tero milionoj da esperantistoj laboris kaj laboras por la sukceso de Esperanto. Nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“ jam atingis kaj superis kvarmil¹ abonantojn dank' al la penoj de la bulgaraj esperantistoj. Tio ĉi estas granda sukceso, kiu per si mem montras ilian volon batali abnegacie por la venko de la Internacia Lingvo.

La atingo de kompreniĝo kaj paco inter la popoloj estas la granda kaj glora celo de ĉiuj esperantistoj. La bul-

¹ Nun „Bulgara Esperantisto“ havas jam 5000 abonantojn.

juro d-ro Josif Fadenheht (en la pasinta epoko ankaŭ ministro de la justeco), kiu tiam ellernis Esperanton aŭtodidakte kaj sekve de mia invito aliĝis al UEA kaj al la tiama Internacia Scienca Asocio Esperantista.

En 1924 Simeon Petkov parolis je temo „La Internacia Lingvo kaj la progreso“ en unu el la tradiciaj publikaj kunvenoj, aranĝataj ĉiujare dum la Verdaj Esperanto-Semajnoj en tiu periodo. Lian ĉiokazan paroladon oni povas legi en „Bulgara Esperantisto“, jarkolekto VI (1924/25), n-ro 3—4, pĝ. 49.

Ankaŭ en la lastaj jaroj la sofiaj esperantistoj havis okazon aŭdi liajn koncizajn, sed sencoplenajn eldirojn en kelkaj solenaj kunvenoj.

La tero akceptis la korpon de nia karmemora samideano la 15-an de junio. Ĉe la tombo per emocij vervaj vortoj s-ano Kunĉo Vălev priskribis la agadon kaj la meritojn de Simeon Petkov kaj liajn altajn kvalitojn de homo;

garaj esperantistoj Georgi Nikolov, Georgi Aktarĝiev, Ivan Krestanov kaj Simeon Petkov, pri kiuj tiel bele parolis hodiaŭ d-ro Boris Nedkov, donis el la tuta koro kaj profunda konvinkosian modestan kontribuon por la venko de la Lingvo Internacia.

Tri el la hodiaŭaj honoritoj ne estas vivaj, sed iliaj faroj vivas kaj vivos.

De mia flanko mi, kiu jam atingis la aĝon de okdek kvin jaroj, ĝojas, ke mi povis ĝisvivi kaj vidi la grandan progreson de nia amata Esperanto, kiu „paŝo post paŝo, post longa laboro“ ne nur atingos, sed atingas „la celon en gloro“.

Vivu kaj sukcesu ĉiuj esperantistoj!

Vivu kaj sukcesu ĉiuj batalantoj por kompreniĝo kaj paco inter la popoloj!

Vivu kaj sukcesu la internacia lingvo Esperanto!

la funebra parolado en la fino transformiĝis en brilan apologion de Esperanto — la afero, al kiu la forpasinto dediĉis tiom da jaroj de sindona laboro.

Reprezentanto de la sofia advokataro per emociaj vortoj karakterizis la forpasinton kiel juriston kun granda erudicio kaj klara menso kaj kiel homon rimarkinde honestan, modestan, profunde homaman, pretan ĉiam doni helpon kaj konsilon al la bezonantoj.

Simeon Petkov estis proklamita honora membro de Bulgara E-Asocio (dum la X Bulgara E-Kongreso, Târnovo, 1923).

Granda estas la doloro de la bulgaraj esperantistoj: la Movado perdis unu el la grandaj figuroj, kiuj desegnis ĝian vojon kaj gvidis ĝin al stabiligo kaj al sukcesoj. Lia nomo inde ornamas la paĝojn de la historio de la Bulgara Esperanto-Movado

Atanas D. ATANASOV — ADA
vicprezidanto de la Akademio
de Esperanto



VIVO — EKZEMPLO

Nedisigebla parto de sia liberama popolo, la bulgaraj esperantistoj donis karajn viktimojn por la triumfo de la libero en nia patrolando.

En la heroa batalo kontraŭ la fasismo donis sian junan vivon ankaŭ Ivan Kādev.



Li naskiĝis je la 11-a de junio 1911 en v. Probuda — distrikto de Tārgovište. Lerninte komence en Tārgovište, poste li finis la maristan lernejon en Varna. En 1934 Kādev estis sendita staĝi en Ruse, kie li konatiĝis kaj laboris kune kun la fama antifasisto Jurdan Ljutibrodski, kiu tiutempe estis eksterleĝa. En 1935 la polico lin arestis kaj li estis juĝita kune kun Ljutibrodski. El la malliberejo Kādev el-

iris en 1937 kaj ekloĝis en u. Preslav, kie li eklaboris kiel maŝinisto en la muelejo de siaj fratoj.

Eklerninta la internacian lingvon Esperanto jam kiel lernanto, forte obsedita de la ideo pri frateco kaj solidareco inter ĉiuj laboruloj en la mondo, ĉi tie, en la muelejo, Kādev utiligas ĉiun liberan minuton por perfektigi sin en la lingvo, multe korespondas kun eksterlandaj esperantistoj, propagandas ĝin, kvankam sekrete. La longjara esperantisto Dimitr Šopov de Preslav rememoras: „En la jaroj, kiam Kādev estis muelisto, mi iris por mueli cerealojn kaj havis eblecon interparoli kun li pri eventoj en la mondo. Tiam li konatigis al mi la internacian lingvon Esperanto, facilan eĉ por homoj, kiuj ne havis eblecojn ricevi pli altan instruon.* Li rakontis al mi, ke per Esperanto oni povas kontakti kun siaj kolegoj el la tuta mondo. Kādev avertis min ne diskonigi publike nian konversacion, ĉar nuntempe oni pensas, ke Esperanto estas dua lingvo por la proletoj post la gepatra, kaj ĝiaj adeptoj estas konsiderataj kiel komunistoj. Post mia konversacio kun Ivan Kādev mi ekamis Esperanton, ellernis ĝin kaj ankaŭ nun mi estas esperantisto. Neniam mi forgesos la bravan batalanton por libero kaj egalrajto de la subpremitoj kaj senrajtigitoj, mian unuan instruiston de Esperanto Ivan Kādev.“

En Preslav Kādev konatiĝis kun grupo de aktivaj komunistoj kaj eklaboris por fortigi la vicojn de la Ko-

munisa Partio kaj Rems.¹ Dum tiu tempo li estis membro kaj poste sekretario de la regiona komitato de la Partio. La muelejo fariĝis loko, kie kunidis kaj kunvenis membroj de ambaŭ organizaĵoj.

En la aŭtuno de 1941 Kāndev estis arestita kaj sendita en la koncentrejon „Enikoj“. En novembro 1943 oni lin liberigis. Reverŝinte en Preslav li rekomencis labori en la muelejo. Tiam en la ĉirkaŭaĵo jam funkciis partizana taĉmento, kun kiu Kāndev konatigis. La muelejo fariĝis provizora bazo kaj loko por renkontoj de la partizanoj.

¹ Rems—RMS (Laborista Junulara Unuiĝo)—la komunistar-unuiĝo de 1^a junularo dum la faŝisma kaj kapitalisma periodo en Bulgario.

En decembro Kāndev denove estis arestita. En la polico oni kruele torturis lin. Kvankam la faŝistaj bestoj rompis liajn brakojn, la firma komunisto Ivan Kāndev ne elbuŝigis eĉ unu perfidan vorton.

La 16-an de decembro 1943, post kiam la faŝistaj policianoj malsukcesis ricevi konfesojn de li, ili mortpafis lin „ĉe provo por forku-o“, kiel stereotipe oni diris en tiu terura tempo.

La ideoj, por kiuj mortis Ivan Kāndev, jam 30 jarojn triumfas en nia patrolando.

Nun la plej nova esperantista societo en distrikto de Ŝumen, fondita ĉe la Uzino por postaŭtomobilaj veturiloj en Preslav portas la nomon de la neforgesebla Ivan Kāndev.

*Cvjetko Todorov
Ivan Smokov*

ORGANIZA VIVO

REVOLUCIA FESTO EN ASENOVGRAD

La 7-an de majo ĉ. j. E-Societo „David Sasonov“ en Asenovgrad kune kun la Distrikta E-Komitato en Plovdiv aranĝis solenan celebrazon honore al la 30-a datreveno de la socialisma revolucio en nia lando kaj al la 32 datreveno de la morto de nia patrono David Sasonov — elstara antifaŝisto kaj esperantisto. Unue granda grupo de esperantistoj metis florkronon sur la monumenton de la pereintoj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo.

Vespero en unu el la salonoj de la moderna hotelo-restoracio „Asenovec“ kolektiĝis pli ol 130 geesperantistoj de Asenovgrad, Plovdiv kaj Karlovo.

Post salutparolo de la vicprezidanto de la dommastra societo sekvis salutparolo en la

nomo de la Estraro de CK de BEA fare de ĝia membro Bojidar Leonov.

Riĉa kaj altnivela literatur-muzika programo estis prezentita de la loka lernanta E-grupo. Ĝi faris fortan impreson al la ĉeestantoj, kiuj aplaudis ĉiun programeron daŭre kaj forte.

Fine sub la sonoj de muziko de esperantista orkestro okazis dancoj kaj amuzado ĝis malfrua horo.

La sekvan tagon la grupo de Karlovo, akompanita de esperantistoj el Asenovgrad, faris ekskurson al la fama monaĥejo de Baĉkovo.

Asenovgradanoj ankoraŭfoje montris, ke ili povas aranĝi bone similajn solenaĵojn. Ĉi-foje ĉefan meriton havis la E-instruistino kaj gvidantino de la lernanta E-grupo Ŝinka Filaretova.

Atanas Gaev

CELEBRO DE ESPERANTISTOJ-HEROOJ

Lige kun la 30-jara jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario, je la 10—11 de junio ĉ. j. en Velingrad estis solene celebrataj la esperantistoj-herooj Vela Peeva, Stoju Kalpazanov kaj Angel Ĉopev, pereintaj en la kontraŭfaŝista batalo.

La celebrazon organizis la loka E-Societo „Stoju Kalpazanov“, la Landa Sekcio de MEM kaj la Distrikta E-Komitato de Pazarĝik. Venis pli ol 150 esperantistoj el Pazarĝik, Karvevo, Smoljan, Feŝtera, Sofia k. a.

Je la 10 de junio la esperantistoj metis florkronojn sur la memortabulon de A. Ĉopev kaj la lokon, kie estas enterigita la kapo de la partizanino Vela.

La vesperon en la kinasalono de kulturdomo „Vasil Levski“ en kvartalo Kamenica okazis granda memorsolenajo, kiun ĉeestis pli ol 400 esperantistoj kaj neesperantistoj. En la prezidiumo sidis la frato de Vela Peeva — Todor Peev, prezidanto de la Urba Komitato de Patrolanda Fronto, la edzino de A. Ĉopev —



SOLIDARECO KUN LA BATALANTA ĈILIA POPOLO

La bulgaraj esperantistoj varme simpatias la popolo de Ĉilio, batalanta por libero kaj socia justeco — kontraŭ la faŝista hunto. Multloke ili organizis kunvenojn defende al ĝi.

Granda tuturba kunveno okazis fine de junio en urbo Kazan'ak. Ĝi estis organizita de la loka E-societo „Roza Valo“, de la urba komitatoj de Patrolanda Fronto kaj Komsomolo, de la Urba Komitato por Defendo de la Paco kaj la Urba Kulturdomo „Iskra“. En la kunveno parolis ĵurnalistino Ŝeli Avramova, ŝi estis korespondantino de nia centra ĵurnalo „Oteĉestven Front“ en Ĉilio dum la tempo, kiam registaro de la lando estis el la Bloko de la Popola Unueco kaj poste travivis la terurojn de la faŝista hunto pasintjare. La rakonto de la ĵurnalisino pri la reŝoviga afero de la registaro de prezidento Salvador Allende kaj pri la ekskluzive kruelaj krimoj de la furiozanta faŝista hunto profunde emociis la publikon. La kunveno unuanime akceptis protestan rezolucion kun insisto, ke oni ĉesigu la teroron

kontraŭ la ĉiliaj patriotoj, liberigu la politikajn malliberulejn kaj restarigu la rajton de la popolo.

La sofiaj esperantistoj ankaŭ esprimis sian solidarecon kun la batalo de la ĉilia popolo. La 10-an de julio la Sofia E-Societo „M. Gorkij“ — unu el la plej grandaj en la tuta mondo — organizis amasan kunvenon. En ĝi parolis la ĵurnalist-esperantisto Violin Oljanov Li substrekiis, ke nun en la tuta mondo bolas protesta movado kontraŭ la faŝista hunto; rakontis pri la kontraŭproceso en Kopenhago, organizita de Internacia Komisiono por Esploro de la Krimoj de la Militluno en Ĉilio. La faktoj, prezentitaj de atestantoj antaŭ tiu Komisiono, parolas pri krimoj egalaj al la hitleranaj. La raportanta ĵurnalisto sciigis pri la Alvoko de la Tutropa Konferenco por Solidareco kun la Ĉilia Popolo al la tutmonda socio kaj substrekiis, ke eĉ ne unu esperantisto en la mondo devas stari flanke de la batalo por tuja ĉesigo de la teroro en Ĉilio, por restarigo de la politikaj rajtoj kaj liberecoj de la ĉilia popolo.

La kunveno akceptis protestan rezolucion

ESPERANTISTA RENKONTIĜO EN BORIMA

Ĉe la piedoj de Balkano, sur pitoreska kaj dronanta en verdaj loko, situas la florplena vilaĝo Borima. Ĝi estas fama pro sia malnova kaj agema esperantista societo, kiu ne vane portas la nomon „Nova Mondo“. Per propraj monrimedoj kaj libervola laboro la entuziasmaj kaj entreprenemaj societanoj antaŭ kelkaj jaroj konstruis ekster la vilaĝo koketan Esperanto-domon, kiu allogas la scivolemajn rigardojn de veturantaj homoj al Sofio aŭ al Trojan.

Ĉi-jare la Distrikta Komitato de Bulgara E-Asocio en Loveĉ kaj la E-Societo „Nova Mondo“, kunlabore kun la Patrolanda Fronto kaj la Komsomolo, aranĝis en Borima renkontiĝon de esperantistoj el la distrikto de Loveĉ. Tiun kolektiĝon la verdaj batalantoj por paco kaj amikeco dediĉis al la glora 30-jara jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario.

Ĉe vesperiĝo, je la 8-a de junio, sur la vilaĝan placon venis pli ol 80 membroj de la kvar societoj en la distrikto: „Espero“ kaj „Balkano“ el Loveĉ, „Balkana Stelo“ el Trojan kaj la gastama „Nova Mondo“ de Borima. Eliris ankaŭ multaj neesperantistoj. Ekludis mu-

Zorka Stoilova, la sekretario de la Urba Komitato de BKP Petr Kalojanov, la prezidanto de la Komitato de Arto kaj Kulturo Angel Goranov, la membro de la Estraro de Bulgara E-Asocio Bojidar Leonov, la sekretario de la Distrikta E-Komitato Petko Arnaudov, la prezidanto de la loka E-Societo „St. Kalpazanov“ — Manol Ĉolev k. a.

Pri la vivo kaj la batalo de la fidelaj ge-
dele parolis Manol Ĉolev. En la nomo de CK
de BEA salutis la ĉestantojn B. Leonov.

Sekvis riĉa altnivela belarta programo en Esperanto kaj bulgara lingvo. Ĝin plenumis aktivuloj de le loka E-Societo kaj lernantoj el la fundamenta lernejo, kiuj lernas Esperanton. Fine oni projekciis filmojn pri la belega kurackaj ripozloko Velingrad kaj ĝia ĉirkaŭaĝo. Post la solenaĵo okazis komuna vespermangxo en restoracio „Bor“.

La 11-an de junio reprezentaj grupoj de esperantistoj el diversaj loĝlokoj grimpis sur la montaron por viziti la pereolokon de Ve'a Peeva kaj Stoju Kalpazanov. Tie ili prezentis florkronojn kaj klinis la kapojn antaŭ la memoro pri la popolaj herooj-esperantistoj.

Manol Ĉolev



Geruflekse antaŭ la pereoloko de St. Kalpazanov.



ziko, komenciĝis viglaj rondodancoj.

Poste en la plenplena salono de la legejo okazis la solenaĵo mem, kiun malfermis la prezidanto de la Vilaĝa Komitato de Patrolanda Fronto kaj aktiva esperantista estrarano Stojĉo Ŝoškov. Sekvis salutparoloj: je la nomo de DK de BEA varmajn salutojn prezentis la prezidanto Asen Matev; je la nomo de Societo „Espero“ — Loveĉ, parolis Ilija Ivanov; de E-Societo „Balkana Stelo“ — Trojan, salutis d-ro Petăr Paĉev; de la esperantistoj el Gabrovo — k-do Metju Metev. La vicprezidanto de DK de BEA Ĉoĉo Kolarov tralegis emocian kaj faktoplenan raporton „Tri jardekojn laŭ la vojo de la socialismo“. Li faris historian observon de la honesta kaj sindona vivo kaj agado de multaj esperantistoj-revoluciuloj en nia regiono, kiuj batalis kontraŭ la kapitalismo kaj faŝismo. La raportanto emfazis, ke la nuntempaj iliaj posteuloj senrezerve subtenas la pacan politikon de la Bulgara Komunista Partio kaj fordonas sciojn kaj fortojn por la prospero de nia popolo.

Post la raporto, multfoje aplaŭdita, la ĉeestantoj ĝuis riĉan kaj belan programon de bulgaraj kaj Esperantaj kantoj kaj versaĵoj, prezentitaj de la legeja ĥoro kaj de la kantgrupo de E-Societo „Espero“ — Loveĉ. Tiu ĉi neforgesebla vespero finiĝis per gajaj dancoj kaj ludoj ĝis noktomezo.

La sekvantan tagon — suna kaj freŝaera dimanĉo — okazis recitalo de Esperantaj revoluciaj poezio kaj kanto. Ĝi estis aranĝita apud la svelta Esperanto-domo, kiu leviĝas en mirinda ĉirkaŭaĵo el arbaro kaj verdaj herbejoj. Denove venis amase vilaĝanoj, denove ludis la muziko. Altnis melodiaj kantoj kun emociaj versaĵoj.

Ĉiuj kvar societoj prezentis sin per varia programo. Fine la ĵurio distingis per premioj la plej bonajn plenumantojn.

Unuan premion por deklamado gajnis la malgranda esperantisto Jovko Iliev pro la emocia recito de „Balado pri la komunismo“ de Veselin Andreev, kaj Nadejda Petrova, kiu ŝajnis vera aktorino, deklamante la poemon „Bulgario“ de Georgi Ĝagarov. Estis premiitaj ankaŭ Atanaska Baltijska, Dimităr Kostadinov, Jovka Kaleva, Violeta Stefanova, Sabie Ĉakárova. Por kantado unuan premion meritis la dueto de Petrana Ĉoĉova kaj Nadejda Petrova, kiu plenumis fragmenton el la kanto „Ludas ŝalmo sur herbejo“ laŭ teksto de Hristo Botev. Distingitaj estis ankaŭ Maria Oreškova kaj la kantgrupo de Societo „Espero“.

Tiu gaja kaj emociplena tago restos en la memoro de la esperantistoj kaj la gastamaj vilaĝanoj de Borima.

Ilija Ivanov

Recitas Nadejda Petrova

FRUKTODONA KUNLABORADO

La esperantistoj de Ŝumen aktive partoprenas la agadon de la urba organizaĵo de Patrolanda Fronto. Ekde kelkaj jaroj ili starigis aparte intimajn ligojn kun ĝia Urba Komitato. Tiuj ligoj fortiĝis ankoraŭ pli, kiam BEA farigis kolektiva membro de la Patrolanda Fronto. La prezidanto de UK Stojan Petkov kaj ĝia sekretario Dimităr Ivanov ĉiam interesiĝas pri la vivo de nia E-Societo „Vekiĝo“, ĉe neceso morale kaj materiale subtenas nian agadon.

La cirkulero de CK de BEA por vigla partopreno en la jaraj kunvenoj kaj konferencoj de la Patrolanda Fronto estis traktita en ĝenerala kunveno de nia Societo. Ĝi impulsis la membrojn prezenti ankoraŭ pli inde la E-movadon kaj krei novajn pli vastajn eblecojn por plua kunlaborado kun la plej amasa organizaĵo de la bulgara popolo. En la kunvenoj de la malsupraj organizaĵoj de Patrolanda Fronto ĉeestis multe da esperantistoj, kiuj partoprenis ankaŭ la diskutadon. Nun kiel prezidantoj de tiaj organizaĵoj estas elektitaj niaj esperantistoj Ivan Smokov kaj Dimităr Ĵekov, kiel sekretario — Radenko Iliev. Dimităr Penĉev kaj Dimităr Zagorski estas aktivuloj en la urba komisiono por popola kontrolo. Kiel delegitoj en la urba konferenco partoprenis Liljana Ŝmokova kaj Cvjarka Stojanov.

Jam duan fojon kiel membro de la Buroo de UK de Patrolanda Fronto estas elektita k-do Atanas Bojaĝiev — membro de CK de Bulgara E-Asocio. En la jara raporto de UK estis aparte menciita la bona kunlaborado de la esperantistoj kaj la Patrolanda Fronto. Kun preceto kaj entuziasmo la esperantistoj de Ŝumen donas siajn fortojn por plenumo de ĉiuj decidoj de la VII-a Kongreso de Patrolanda Fronto por plena reorganizo de ĝia agado, por inda renkontiĝo de la 30-a datreveno de la popola regado en Bulgario.

Cvjatko Todorov



Je la 30 de junio en u. Pazarĝik estis inaŭgurita la nova, propra Esperanto-domo. Ĝi troviĝas en la centro de la urbo sur str. „General Gurko“ 3-a kaj ampleksas: salonon kun 100 sidlokoj (ĉe neceso ankoraŭ 50), vastan kancelarion kaj ankoraŭ 3 helpĉambretojn. Hejtado — vapora.

La inaŭguron partoprenis pli ol 150 esperantistoj el Pazarĝik, Sofio, Plovdiv, Ĥaskovo, Asenovgrad, Velingrad, Peŝtera, Batak, Momina Klisura, Piŝtigovo k. a.

Je la 10 horo la reprezentanto de la Estraro de CK de Bulgara E-Asocio Nenko Jonkov transis la rubandon, bondezirante: „Mi gratulas al vi la novan Esperanto-domon — la unua en nia lando propra E-domo!“

Detalan raporton pri la historio kaj nuna stato de la E-Movado en Pazarĝik faris Petko Arnaudov — sekretario de la Distrikta Komitato. Li substrekis, ke ĉi tie oni fondis Esperanto-grupon jam en 1904 j. Multe kaj entuziasme laboris la esperantistoj de Pazarĝik, dank' al kio la urbo fariĝis unu el la fortikaĵoj de Esperanto en la lando. Multaj el la lokaj esperantistoj partoprenis aktive la kontraŭfaŝistan batalon, kelkaj heroe pereis en ĝi. Dum la tridek forpasintaj liberaj jaroj la pazarĝikaj esperantistoj aktive partoprenis la konstruadon de la socialismo, laboris sindone por la progreso de sia urbo kaj de la tuta lando.

Salutparoladojn faris: Nenko Jonkov — en la nomo de CK de BEA; li ankaŭ de-

koris per la ora insigno de BEA 6 esperantistojn kaj neesperantistojn, kiuj grave kontribuis por la konstruo de la nova domo: Dragan Draganov — en la nomo de la Distrikta Komitato de la Bulgara Komunista Partio, de la Distrikta kaj Urba Popolaj Sovetoj kaj de la Distrikta Konsilantaro de la Sindikatoj; li diris, ke la socio de la urbo alte taksas la noblan agadon de la esperantistoj kaj helpas ilian laboron; k-do Draganov promesis donacon de bildo valoranta 100 levojn aŭ la sumon mem; Zahari Ivanov — prezidanto de la Landa Sekcio de MEM; Georgi Miĥalkov el Sofio — en la nomo de la E-junlaro; Miĥail Danĉev — prezidanto de la Distrikta E-Komitato en Plovdiv; Boris Ljakov — prezidanto de la loka Filatelista Societo (donacante 100 levojn).

Estis ricevataj multaj salutleteroj kaj telegramoj el la lando kaj eksterlando, de la E-redakcioj de Radio Varsovio kaj Radio Vieno, de esperantistoj el USSR, Francio, Ĉeĥoslovakio, Nederlando k. a. Multaj el ili sendis donace librojn, gramofondiskojn k. s. por la nova E-domo.

Oni aplaŭde akceptis telegramojn al CK de BKP kaj CK de BEA.

Post la fermo de la inaŭguro la esperantistoj prezentis florkronon al la monumento de Georgi Stefanov — la fondinto de la Komunista Partio en la urbo.

Minko Conkovski

INTERVJUO

La reprezentanto de nia Redakcio Minko Conkovski starigis kelkajn demandojn al la sekretario de la Distrikta E-Komitato en Pazarĝik Petko Arnaudov, kiu estis afabla ilin respondi.

Demando: Kiel aperis ĉe vi la ideo pri konstruo de propra E-domo en Pazarĝik?

Respondo: Por la bezonoj de la pli kaj pli kreskanta Esperanto-movado en Pazarĝik ni ĝis nun uzis la salonojn de kelkaj sociaj organizaĵoj en

la urbo. Kvankam ili havis favoron al ni, ofte pro iliaj propraj aranĝoj, fiksitaj samtempe kun la niaj, ni devis cedi. Tio kaŭzis embarasojn en nia laboro. Tiu stato igis nin konstante pensi kaj revii pri propra klubejo.

Demando: De kie vi trovis rimedojn por konstrui propran domon?

Respondo: Ni aliĝas al ĉiuj politikaj kaj ekonomiaj entreprenoj de tuturba kaj distrikta karaktero — celebroy de festoj, de rondaj datrevenoj, de pereintaj kontraŭfaŝistoj kaj elstaraj so-



P. Arnaudov raportas



ciagantoj, laborbrigadoj k. a. Agante tiamaniere ni ricevis socian aŭtoritaton kaj ĝuis moralan kaj poste materialan subtenon.

Kion ni faris? Unue ni mem decidis helpi nin. Ni petis kaj oni permesis al ni organizi mastrum-agadon. De tiu agado ni gajnis certan sumon. Monnan subtenon de ĉ. 7000 levoj ni ricevis de la Distrikta Popola Soveto, 2000 levojn — subtenon de Bulgara E-Asocio. Tio estis sufiĉa por komenci la konstruaĵon, kiu kostis entute ĉ. 11 000 levojn. Por ĝia ekipado — seĝoj, skribotabloj, kurtenoj, standardoj k. s., samtiel por certigo de monrime-
doj por preparo de instruistaj kadroj ni anoncis libervolan monkolektadon antaŭ la membroj de la distrikta E-or-

ganizaĵo. Por la celo ni elektis apartan komisionon kaj faris specialan adreson por enlistigi ankaŭ iujn entreprenojn. Tiel entrepreno „Panproduktado“ donis 500 lv., la direkcio de „Produktado de viandaĵoj“ — 500 lv., la Akumulatora Uzino — 500 lv. kaj iuj aliaj entreprenoj — po 100, 200 lv. Tiamaniere kolektigis ankoraŭ ĉ. 3000 lv.

Demando: Kiel la socio rilatas al tiu ĉi via iniciato?

Respondo: Kun admiro.

Demando: Kiajn perspektivojn vi vidas havante jam propran domon?

Respondo: Jam malkovriĝas riĉa ebleco por vasta kaj pli fruktodona Esperanto-agado — okazigo de kunvenoj, kunsidoj, junularaj aranĝoj, renkontado de eksterlandanoj ktp.

AL LA CENTRA KOMITATO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO SOFIO

Karaj gekamaradoj!

La esperantistoj de urbo Pazarĝik, el ĝia distrikto kaj gastoj el la lando, kolektigintaj por la solena inaŭguro de la nova Esperanto-Domo en Pazarĝik, sendas al vi sincerajn salutojn kaj bondezirojn pri novaj sukcesoj de la Bulgara Esperantista Movado.

Fiero por la esperantistoj de Pazarĝik kaj la distrikto estas la helaj nomoj de la pereintaj en la batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo esperantistoj de nia distrikto: Vela Peeva, Stoju Kalpazanov, Angel Ĉopev, Stefan Ŝkodrov, Teofil Daŝinov, Nikolaj Beĉev, Petâr Miŝev, Georgi Prekunov k. a.

La esperantistoj de Pazarĝik kaj el ĝia distrikto donos ĉiujn fortojn por realigo de la decidoj de la Deka Kongreso de Bulgara Komunista Partio kaj de la Nacia Partia Konferenco.

Akirinte propran domon, la esperantistoj de Pazarĝik kaj ĝia distrikto klopodos por plej vasta propagando de la celoj kaj taskoj de la Bulgara E-Asocio, por vastigi la instruadon de la Internacia Lingvo. Ili laboros entuziasme por amikeco kaj paco inter la popoloj, por la internacia kompreniĝo kaj kunlaborado.

Vivu eterne la afero de la Bulgara Esperantista Asocio!

Vivu eterne la paco kaj la amikeco inter la popoloj!

Vivu eterne kaj floru nia amata Patrolando — Popola Respubliko Bulgario!

DE LA PARTOPRENINTOJ EN LA INAŬGURO
DE LA E-DOMO EN PAZARĜIK



GASTO EL GFR

La 5-an de junio ĉ. j. Adolf Schwarz (Ŝvarc) el urbo Heilbronn (GFR), veturante al nia ĉamara ripozejo „Albena“, estis gasto de E-Socio „Radio“ en urbo Pazarĝik.

Li vizitis la novekonstruitan Esperanto-domon, donis kelkajn ideojn pri la arango de la klubaj vitrinoj kaj la surstrata fasado.

Poste okazis renkontiĝo kun la societanoj, al kiuj li rakontis pri sia konatiĝo kun Esperanto, pri sia veturado tra la mondo, pri sia socia agado.

Adolf Schwarz estis aktiva membro de la grupo de progresemaj germanaj esperantistoj, unu el la kunfondintoj de la Internacia Laborista Esperanto-Movado. Longe li laboris kiel internacia Rabsektor¹ kaj estis membro de la delegitaro vizitinta Sovetuniojn kelkajn jarojn antaŭ la Dua Mondmilito.

Poste s-ano Schwarz parolis pri siaj bonegaj impresoj de la bona akcepto flanke de bulgaraj esperantistoj kaj la neforgeseblaj rememoroj pri naturaj belajoj de Bulgario, parton de kiuj li jam sukcesis vidi.

Dum la tuta kunestado regis atmosfero de amikeco kaj bonhumoro. La societanoj longe memoris tiun renkonton.

¹ Laborista-kamparana korespondanto.

P. A.

ASEN GRIGOROV — GASTO AL LA BLINDULOJ EN PLOVDIV

Iniciate de la blindula E-Societo „Lumo“ kaj de la Distrikta Konsilantaro de la blinduloj en Plovdiv, enkadre de la arangoj omaĝe al la 30-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario, okazis renkontiĝo kun la elstara socia aganto, aktiva batalinto kontraŭ la faŝismo kaj E-poeto Asen Grigorov.

La 25-an de majo 1974 en la Kultura Domo de la DK kunvenis multe da esperantistoj de ĉiuj enurbaj societoj, asociaj membroj kaj laboristoj de la blindula entrepreno „Uspeh“.

Post prezento de la gasto al la ĉeestantoj lia ekslernanto — malnova esperantisto Ivan Andonov recitis unu el liaj plej belaj versaĵoj — „Espero nia“.

K-do Grigorov rakontis kun amplena sento pri la sep jaroj, kiujn li kiel instruisto pasigis inter la lernantoj en la Instituto de Blindaj Infanoj, pri siaj amikoj-blinduloj, pri ilia ekskluziva kapablo lerni Esperanton. Poste li transiris al la ŝtorma periodo en la vivo de nia lando tuj post la venko de la socialisma revolucio. Ĉiuj kun granda intereso aŭskultis liajn rememorojn pri la gvidinto kaj la homo Georgi Dimitrov, pri lia ekskluziva laboremo kaj

legendeca modesteco, pri lia senlima homamo kaj preteco helpi al ĉiuj.

En la nomo de DK oni prezentis al la gasto florojn kaj modestan donacon — memoraĵon de Plovdiv. La kunveno estis fermita, sed la ĉeestantoj ne disiris. La karan gaston ĉirkaŭis iamaj liaj lernantoj-esperantistoj. La konversacio daŭris longe. Oni interŝanĝis rememorojn, parolis pri nunaj taskoj kaj iniciatoj.

Tio estis rimarkinda kora renkontiĝo.

Vladimir Jeleu

EKSKURSO AL GROTO

La esperantistoj el urbo Ruse organizis la 16-an de junio ekskurson al la groto apud v. Pepelina, distrikto de Ruse. Malgraŭ la pluva vetero partoprenis du grupoj: ĝeneralanta, gvidata de ing. Georgiev, kaj civitana, gvidata de Cankov — rezidanto de la Distrikta E-Komitato, kaj Dobrev — prezidanto de E-Societo „Libero“. Partoprenis ankaŭ germana gasto.

La groto situas ĉe la bordo de rivero Ĉerni Lom. La ekskursantoj gvidataj de specialistoj ĝuis la mirigajn figurojn de la subtera mondo, kreadoj de la kaprica ludo de la akvo. Ili aŭdis ankaŭ interesan rakonton pri la eltrovo de la groto fare de juna paŝtisto.

Ĉiuj partoprenintoj estis tre kontentaj.

B. Kavalĝiev

RENKONTIĜOJ KUN FRANCAJ ESPERANTISTOJ

En majo ĉi-jare mi vizitis ofice Francion kiel gvidanto de grupo de aŭto-laboristoj el nia entrepreno „Internacia Transporto.“ Ni estis en la firmo „Berlić“ en Liono (Lyon) — bela urbo kun pli ol unu miliono da loĝantoj. Tiu firmo produktas specialajn pezajn ŝarg-aŭtomobilojn, per kiuj nia entrepreno transportas varojn el diversaj landoj de Eŭropo kaj la proksima Oriento. Komence de tiu ĉi jaro ni ricevis aŭtomobilojn de nova modelo kaj koneks kun la kontrakto inter nia entrepreno kaj la firmo „Berlić“ tiu lasta devis organizi por niaj laboristoj malŝanĝon kurson pri la karakterizaĵoj de la nova modelo.

El la Kongreslibro de la Londona UK de Esperanto (1971) mi havis kelkajn adresojn de esperantistoj el Liono. Mi kontaktis kun ili telefone kaj jam la sekvan vesperon post nia alveno mi estis en medio esperantis'a — renkontiĝo kun la estraro de la loka E-societo kaj aktivuloj. La sekvan tagon loka esperantisto afable montris al nia grupo la vidindaĵojn de la urbo. Dimanĉe — ekskurso al Grenoble, aranĝita de la firmo. Tie mi denove renkontiĝis kun esperantistoj.



Ni, du bulgaraj geesperantistoj, estis tre felikaj gastoj al la esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko lige kun ilia Nacia Konferenco, kiu okazis je la 1-3 de junio ĉ. j. en Berlino.

La Konferenco partoprenis 140 delegitoj el GDR kaj eksterlandaj delegitaroj el Sovetunio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Pollando kaj Bulgario.

La prezidanto de la Centra Laborrondo Esperanto Rudi G. Aetzel (Grec) faris imponan raporton pri ĝia agado dum la lastaj du jaroj. Li emfazis la valoran kontribuon de la esperantistoj de GDR por popularigo de la atingoj de sia patrolando tra la tuta mondo, por firmigo de paco kaj sekureco inter la popoloj — kontraŭ la imperiismo kaj la imperiismaj militoj. Dank' al tiu pozitiva agado kreskas konstante la aŭtoritato de la Esperanto-movado en la lando enkadre de la Kultur-ligo de GDR.

Krom traktado de la ĝenerala agado de la E-movado en la lando, okazis ankaŭ sekciaj kunidoj, en kiuj oni okupiĝis pri la jenaj problemoj: regiona agado; junularo; historio de la laborista E-movado; lingvistiko (prelegis la sovetia profesoro d-ro Armand); metodiko de E-instruado.

Post la fermo de la Konferenco al la eksterlandaj gastoj estis donita vespermanĝo. Ĉiuj el la gastoj havis la parolon. K-dino Vasja Petrova recitis versaĵojn.

La sekvan tagon laŭ la anticipe fiksita plano okazis ekskursoj. Por nia dumembra delegitaro estis antaŭvidita jena irvojo: Leipzig — Weimar — Erfurt — Karl-Marks-Stadt — Dresden.

Ĉe la stacidomo de Leipzig ni estis renkontitaj de la veterano de la germana laborista E-movado Otto Bessler (Oto Besler) kaj lia edzino. En tiu ĉi urbo ni vizitis la muzeon de nia fama samlandano, instruinto kaj gvidinto

Merkrede okazis ĝenerala kunveno de la esperantistoj de Lio, en kiu mi rakontis pri nia lando kaj E-movado. Oni starigis diversajn demandojn, al kiuj mi respondis. Multaj el la ĉeestantoj estis vizitintaj Bulgarion dum la 48-a UK en 1953 kaj konservis bonajn rememorojn pri ĝi kaj pri la bulgara popolo.

La kunvenon ĉeestis ankaŭ multaj membroj de nia grupo, neesperantistoj. Malgraŭ ke mi estis sola esperantisto en la grupo, miaj kolegoj ĉie havis bonajn kontaktojn dank' al Esperanto. Ili admiris la afablecon de la francaj esperantistoj kaj ĝenerale de la francoj kaj miris, kiel ni tiel bone kaj facile interkompreneblas en tiu nekonata por ili lingvo. Multaj promesis lerni ĝin aŭtune.

Dimităr Petkov

Georgi Dimitrov, la muzeon „Iskra“, kie komence de nia jarcento estis presita la redaktata de V. I. Lenin ĵurnalo „Iskra“, la Monumenton de la Popoloj, dediĉitan al la venko super Napoleono k. a.

La vesperon de la 4-a de junio en la Domo de la Intelektularo ni havis la plezuron renkontiĝi kun la esperantistoj de la urbo. En la kunveno parolis G. Dimov pri la E-movado en Bulgario. V. Petrova recitis versaĵojn de Valeri Petrov kaj R. Schwarz (Svarc). Fine de tiu interesa kunveno ni duope estis vere surprizitaj: oni proklamis nin honoraj membroj de la Distrikta E-Komitato en Leipzig.

En Weimar, kie ni estis renkontitaj de s-ano Hornbogen kaj aliaj esperantistoj, ni vizitis la muzeon de Goethe (Gete), Schiller (Ŝiler) kaj List. Vespere — koncerton.

En Erfurt — la urbo de la floroj — ni rigardis ĝiajn historiajn rimarkindaĵojn. Gvidis nin la tiea esperantisto Harald Mischeel.

En Karl-Marks-Stadt ni estis renkontitaj de nia malnova konato Rudolf Burmeister, vizitinta iam Bulgarion. Ĉi-tien alvenis ankaŭ grupo de ĉ. 30 esperantistoj el Praha, Karlovi Vari kaj aliaj apudlimaj urboj de ĈSR. Ni faris kolektivan viziton en la urba zoologia ĝardeno, kie la bestoj ne estas tenataj en kaĝoj, sed vivas tute libere, en kondiĉoj proksimaj al la naturaj.

En Dresden ni vizitis la faman Zwinger — belegan ekspozicion de originalaj verkoj el malnovaj majstroj de la peniko, ankaŭ la memorlokon de murditaj antifaŝistoj kaj en la ĉirkaŭaĵo de la urbo — la komplekson Pilniz (kasteloj el la XVIII j.).

Ĉie en la lando faris al ni grandan impreson la nova, kontraŭfaŝisma kaj humanisma kulturo de la popolo. Ankaŭ la rapida teknika progreso. Kaj same: la deziro de ĉiu civitano de GDR vivi kaj labori en paco kaj amikeco kun ĉiuj popoloj.

Nia vizito en GDR multe riĉigis nin per valoraj impresoj kaj konoj. Ni kredas, ke ĝi ankaŭ estas kontribuo al la sincera amikeco inter la bulgaraj kaj germanaj esperantistoj.

*Vasja Petrova
doc. Georgi Dimov*

La 14-an de julio ĉ. j.
ESPERANTINA KONSTANTINOVA
kaj
dipl. inĝ. **BOJIDAR DASKALOV**
geedziĝis.

*Gratulon al la nova esperantista
geedza paro!*

PETŬFI EN BULGARIO

Krom la hungaroj, plej bone la bulgarioj konas la poemojn de la granda hungara poeto Sander Petŭfi. Petŭfi estas kaj hungaro kaj internaciisto. Li skribis, batalis kaj mortis por la hungara libereco kaj ĉiam revis pri la mondlibereco. Ne estas eraro, ke la plej grandaj bulgaraj poetoj rekonis lin kiel spiritan fraton de Hristo Botev. Petŭfi kaj Botev estas modeloj de la viva patriotismo, kaj ili kune estas heroldoj de la popola internaciismo.

La tradukoj de plej grandaj bulgaraj poetoj kiel Ivan Vazov kaj Penĉo Slavejkov redonis la poemojn de Petŭfi al la bulgaraj legantoj. La plej multaj bulgarioj konas la poezion de Petŭfi pere de la poemo „La frenezulo“. Ĉi tiun poemon, en grandioza traduko de Ivan

Vazov, la homoj tutlande konis kaj deklamis en Bulgario.

Pli malfrue la elstara reprezentanto de la bulgara poezio Geo Milev kaj poste la plej granda bulgara poetino Elisaveta Bagrjana fariĝis interpretistoj de la plej granda hungara poeto.

En 1945 la bulgara poetino Nevena Stefanova veturis al Hungario por traduki la verkojn de Petŭfi. En ŝiaj interpretoj fariĝis konataj „Johano la Brava“ kaj kelkaj poemoj de Petŭfi antaŭ la bulgaraj legantoj. Dum la pasinta jaro la vivanta bulgara klasikulo Atanas Dalĉev akceptis en sia kolekto-volumo ankaŭ Petŭfi.

J. Termes

AŬSTRA-BULGARA VESPERO EN VIENO

Unu monaton post la Zamenhofa memorsolenajo, per kiu la nova legejo de la Pola Instituto en Vieno estis inaŭgurita, sekvis ne malpli bone sukcesinta vespero, la 18-an de majo, en la Bulgara Kulturdomo.

La sukceso rezultis antaŭ ĉio el la grandioza vervo, per kiu la lertega pianistino Antoaneta Ŝivaĉeva kaj la admirinda violonisto Nikolaj Nanĉev prezentis klasikan kaj modernan muzikon. Ĝi rezultis ankaŭ el la koreco de la vortoj, per kiuj d-ro Nikola Nedev, ĝenerala sekretario de la Aŭstra-Bulgara Societo, kaj s-ro Petr Germanov, de la Kulturdomo, salutis — la lasta esperantlingve — la vigle aplaŭdemaĵn, malgraŭ la forloga serena semjnfino preskaŭ surprize multnombrajn gastojn, inter kiuj estis ankaŭ s-ro Nikola Nikolov, konsilisto de la Bulgara Ambasado.

Koreco esprimiĝis ankaŭ en la malavare aplaŭdataj vortoj pri kaj de Zamenhof, per kiuj s-ro Emil Vokal havigis etike spiritan fokuson al tiu aranĝo. La senata konsilisto d-ro Leopold

Grimm, prezidanto de la Aŭstra E-Federacio, konvinke substrekis ĝian interamikigan karakteron kiel komuna entrepreno de la Aŭstra-Bulgara Societo, Aŭstra Esperantista Federacio kaj la Societo por Internacia Kompreno — Amikoj de Esperanto.

Koktelo kun bulgaraj specialaĵoj — laŭ evidente bonvenaj — kaj altkvalitaj kolorfilmoj pri la bela lando, kiuj ilin liveras, finis la jama tradician, dankindan kultur-vesperon.

K. B.

NOTO de RED. En Bulgara Esperantista Asocio estis ricevita amika salutletero de la ĉeestantoj en la supre priskribita vespero. Sub ĝi — pli ol 52 subskriboj. Esprimante la dankon de BEA ni bondeziras pluajn sukcesojn al niaj aŭstraj samideanoj sur la kampo de Esperanto kaj la internacia amikeco kaj kunlaborado!

El letero de franca esperantistino

Kara amikino Janka,

En via lando mi malkovris novan mondon. Kio impresis min plej multe en via ĉefurbo? Unue — la interhomaj rilatoj. Ili estas vere sinceraj, fratecaj. Mi observis manpremojn kaj manfrapetojn sur la ŝultrojn, ridetojn sur la vizaĝoj de homoj, kiuj proksimiĝas al mi kaj afable alparolas min, invitas min gaste en siajn hejmojn aŭ promeni kaj ekskursi. Kiom multe la bulgarioj ŝatas ekskursi!

Posttagmeze mi vidis milojn da civitanoj promenadi en la Parko de Libereco, ĝui la

rozbedojn kaj ĉeesti... senpagan koncerton sub la centjaraj platanoj — neniam mi vidis tion en Francio!

Mi ŝatas ilian amon al simplaj plezuroj kaj ĝojoj, ilian amon al Vitoŝa-monto. Dum festotagoj oni iras al Vitoŝa — ĉu unuope, ĉu familie, ĉu kun amikoj. Multaj atingas la montopintojn por ĝui de tie belegan panoramon. Kiom da belaj arboj sur Vitoŝa! Kiom da floroj, da birdoj, eĉ kapreoloj!

Mi vojaĝis tra la lando, kaj min impresis

TRA LA E★ MONDO

UNUA JARIĜO EKDE LA MORTO DE D-RO A. K. SKALJSKIJ

Je la 16-a de aprilo 1973 post longedaŭra kaj grava malsano forpasis en sia 85-jaraĝo la honora prezidanto de la Novosibirska Centra E-klubo d-ro Apolono Klementieviĉ Skaljskij.

La tuta vivo de tiu ĉi neordinara homo — komence de la studentaj jaroj kaj ĝis liaj lastaj tagoj — estis dediĉita al la propagandode la Internacia Lingvo, al praktika realigado de la ideoj pri paco kaj amikeco inter la popoloj.

Arda propagandisto, lektoro, organizanto

la senlimaj sunfloraj kampoj, la pom- kaj ĉerizĝardenoj, la tabakplantejoj, la novaj domoj en ĉiuj vilaĝoj, la konstruaĵoj de la agrikulturaj kooperativoj.

Mi rememoras mian rampadon al la roko en monto Rila, kie iam loĝis la ermito Ivan Rilski (Johano de Rila). Pli supre mi vidis alpan paŝtejon kun ŝafaro kaj laktodonaj bovinoj.

Neforgesebla restas la Rila-Monaĥejo kun siaj vastaj ĉambroj kaj arkadoj kun freskoj. Mi admiris la antikvajn librojn en la biblioteko.

Kaj kion diri pri Esperanto en Bulgario? Estas vere, ke antaŭ tiuj tagoj mi nenie sper-

de multaj rondetoj, kursoj kaj renkontigoj, partoprenanto en la fondo de la unua en Siberio oficiala E-klubo, akurata E-korespondanto kun multaj eksterlandaj amikoj, inter kiuj specialan lokon okupas la bulgaraj, d-ro Skaljskij postlasis profundan spuron kaj dankeman memoron en la E-movado en USSR kaj aparte en Siberio.

*El letero de MILICA SOKOLOVA,
membro de la Novosibirska E-klubo*

Lige kun la unua jariĝo de la morto de d-ro Skaljskij ni aperigas ĉi-suban materialon de A. Ĥarkovskij.

LA KAJERO DE APOLONO SKALJSKIJ

Blankhara, alta, svelta: en unu mano bastono, en la alia — kajero, fele binita. Li parolas en preciza, eleganta Esperanto — tia fiksiĝis Apolono Klementieviĉ Skaljskij en la memoro de tiuj, kiuj lin konis. Kaj lin konis multaj dum lia 80-jara vivo.

tis tian nekredetablajn: kvindek esperantistoj samurbanaj — kunvenantaj en unu sama loko. Cent esperantistoj samurbanaj — en unu sama salono! Kaj jen teruraĵo: mi, ĉiam timema en la lernejo antaŭ la instruistoj, mi devis aperi sur la podio!!! Neniam ĝis tiu momento mi parolis publike. Tamen dank' al via helpo kaj al la kortuŝa afableco de ĉiuj mi venkis la danĝeron sufiĉe kontentige, ĉu ne? Milfoje mi dankas vin ĉiujn! Mi trovis ĉe vi veran amikecon. Mi de nun scias, ke se mi bezonus perfektigi min en Esperanto, mi havos la plej bonan lernejon en Sofio, en Bulgario! Tie mi praktikos la lingvon laŭ la rekta metodo, suprengrimante montojn, piedirante kun amikoj, gekunuloj, veturante. Tamen ili devas indulgi min pro mia franca prononcado, precipe pro la sono „r“! Ĉar la r-prononcon mi neniam povas korekti. Sed tio ne gravas. Ankaŭ en Francio mem la orientanoj, nordanoj, sudanoj, okcidentanoj kaj centranoj ne perfekte parolas francan laŭ la akademiea prononco, sed ili bone interkompreniĝas.

Do, mi revenos iam al Bulgario kiel lernantino, ĉar mi sentas, ke vi ĉiuj estos la plej simpatiaj kaj efikaj instruistoj por mi!

Kompreneble, mi bedaŭras, ke mi ne vizitis la marbordon, ankaŭ aliajn vidindajn lokojn. Dum nur dek tagoj mi ne povis pretendi viziti ĉion. Mi do devas reveni, sed vere mi ne scias kiam... mi tute ne scias.

Kara Janka, bonvolu transdoni miajn plej korajn salutojn al la sofia klubanaro, al la samideanoj, kun kiuj mi konatiĝis pli proksime. Bonan sanon al via familio!

Via amikino ODILE



Mi malfermas lian faman kajeron kaj kvazaŭ mi sidigas en la aŭton de la tempo.

...Aprilo de 1914. La adoleskulo Skalskij, embarasite pro emocio, etendas sian kajeron al Zamenhof mem, kaj sur la virga blanka paĝo aperas aŭtografo de la kreinto de l' Internacia Lingvo.

La someron de 1914. Sur la bindaĵo algluita poŝtmarko: „Parizo, 10-a Universala Kongreso de Esperanto, palaco de Gumon, 2—9 de aŭgusto“. Sed la kongreso ne okazis. Jam tra tuta Eŭropo tondris la pafo en Sarajevo kaj la 1-an de aŭgusto komenciĝis milito. La vojo al la patrolando kondukis tra la neŭtrala Skandinavio — tio estas videbla el la notkajeroj de svedaj kaj finnaj esperantistoj. Skalskij havis bonŝancon: lin oni ne internigis pune, kiel multajn aliajn partoprenantojn en la pariza forumo. Kaj jen la 6-an de aŭgusto li feliĉe alvenis en Peterburgo.

Dume en Eŭropo jam pli forte parolis la kanonoj. Al kiu necesis tiam la Internacia Lingvo? Milionoj da germanoj, rusoj, francoj kaj angloj pereadis sur la frontoj por la profitodonaj interesoj de la burĝaro, nomitaj „naciaj“.

La esperantistoj, vestitaj en soldatmanteloj, mortigadis unu la alian. Kaj kiom kostis ĉiuj iliaj kongresoj, paroloj pri „tutmonda frateco“?

Mi foliumas la kajeron de Skalskij. Siberio, tendaro de militkaptistoj. Ĉi tie ne estas pikdratoj, la eksoldatoj povas viziti urbon Omsk. Sed pli forte ol ĉiaj bariloj dividas ilin la lingvaj barieroj kaj la nacia malamo, lerte bruligata de la regpotenculoj.

„La terura milito ne disigis nin, la esperantistojn, sed nur proksimigis nin. Dankon al niaj rusaj samideanoj. Vivu Esperanto!“ (Militkaptito el Aŭstrio Zisoviĉ). Similaj skribaĵoj abundas en la kajero. Lasis ilin ĉeĥoj, hungaroj, germanoj, aŭstroj, kiuj lernis en Siberio la Internacian Lingvon. Hejmen ili

revenis internaciistoj. Multaj el ili batalis en Rusujo por la venko de la Oktobra Revolucio.

La printempo de 1917 jaro estis aparte peza. La fino de la milito ankoraŭ ne videbligis. Krome, la esperantistoj el ĉiuj landoj havis komunan ĉagrenon: mortis Zamenhof. „La morto de Zamenhof ne signifas morton de Esperanto, sed la morto de Esperanto estus spirita pereado de ĝia kreinto.“ „Resaniĝu la sangaj spuroj de la milito kaj sur ilia loko elkresku la floro de l' paco kaj la amikeco — Esperanto.“ Tiuj ĉi frazoj ankaŭ estas en la kajero de Skalskij.

Konsternas nin la multeco de la nomoj. Jen noto pri la blinda poeto Vasilij Eroŝenko, kun kiu Apolon Klementieviĉ renkontigis en Moskvo. Eroŝenko tiutempe preparis sin por Japanio, Hindio, Ĉinio, kie li kreos siajn senmortajn paroladojn en japana lingvo kaj en Esperanto, disputos kun R. Tagore mem kaj estos en kontaktoj kun la granda Lu Sin. Obruĉev, filo de la fama vojaĝanto, ĝojas pri la fino de la milito. Antaŭ li staras ĉio — la malkovro de l' antikva Angarida kaj la Montĉeno de Ĉerskij, la vojaĝo al Ŝpicbergen kaj al Tiva, la membreco en la Akademio de Sciencoj de USSR kaj en la Akademio de Esperanto.

Tamen ne ĉio en la kajero kuŝas je la surfaco. Por tralegi ĝin estas necesa ligo kun la tempo. „Sinceran saluton de la Esperanta Robinson Kruzo. Nikolaj Hohlov.“ Liaj vazaĵoj ankoraŭ antaŭstaras. Li estos mortanta sur la frontoj, nostalgios en Jugoslavio kaj Pollando kaj revenos hejmen je la fino de la 20-aj jaroj por verki sian novan poezian libron „Tajdo“. Kaj mortos en 1953 j. ne sciante, ke li estis granda poeto. Lia gloro venis je la fino de la 60-aj jaroj.

Ligo inter tempomomentoj. Kiu en la 20-aj jaroj konis la nomon de la esperantisto A. Toporov? Nur la lernantoj de la siberia komunumo „Maja



Mateno". Sed antaŭ kvardek jaroj siajn E-versojn enskribis en la kajero de Skalskij ankaŭ lia lernanto Stepan Pavlovič Titov, patro de „Kosmonaŭto 2", veturinta al Hago, al la Universala Kongreso de Esperanto. Du enskriboj en la kajero de Skalskij, sed malantaŭ ili — historio.

Ŝajne, sur ĝiaj paĝoj plej ofte renkontigas vojaĝantoj. Simple turistoj: rusiano, ĉiliano, du litovinoj vojaĝantaj per aŭtostop el Litovio al Uzbekistano. La antropologo kaj verkisto A. Poška, kiu vojaĝis per motorbiciklo el Vilniuso al Hindujo, kie li loĝis ok jarojn. La konata jugoslavia vojaĝanto T. Sekelj, aŭtoro de la libro „Nepalo malfermas pordojn", kaj la moskva profesoro David Armand, kiu traveta-

ris la Malproksiman Orienton.

...Jus finiĝis la milito. Jubilas Praha, savita de la Soveta Armeo. Kaj la rusa oficiro Ivan Palkin skandas, pasante tra la stratoj de la antikva urbo: „Esperanto! Esperanto!". La ĉeĥoj ridetas: tio estas komprenebla sen traduko — Esperanto signifas esperon. Sed ĝi ankaŭ estas lingvo de l' amikeco, kiu unuigas la korojn. Aŭtografado de l' aktiva moskva esperantisto Ivan Palkin ankaŭ vivas sur la paĝoj de la kajero de Skalskij. Ĝuste „vivas", ĉar la lingvo similas al eterne viva, impetanta rivero.

A. Ĥarkovskij

El „Sovetskaja Molodjoj", organo de CK de Komsomolo en Latvio, n-ro 4/1974

LUDWIG RENN

Okaze de lia 85-jaraĝo la Centra Komitato de la Socialista Unueca Partio de Germanio, la Ŝtata Konsilantaro kaj la gvidantoj de multaj kulturaj kaj sociaj organizoj kore salutis la eminentan germanan verkiston Ludwig Renn.



Samkiel M. Gorkij kaj Henri Barbusse, L. Renn alte taksas la internacian lingvon Esperanto kaj praktikis ĝin. Antaŭ ol la germanaj faŝistoj kaptis la ŝtatpotencon, L. Renn apartenis al la Internacio de Proletaj Esperantistoj kaj instruis Esperanton al germanaj laboristoj. Certe nur apartaj legantoj de „Bulgara Esperantisto" memoras, ke la elstara germanlingva verkisto, aŭtoro de la fama romano „Milito", estis ĝis 1933 j. prezidanto de l' Asocio de Proletaj Verkistoj-Esperantistoj, al kiu apartenis kamaradoj el Sovetunio, Germanio, Hungario, Bulgario ktp. Dank' al sia sperteco kiel verkisto L. Renn helpadis al komencantaj poetoj kaj beletristoj, verkantaj en Esperanto. Li rekomendis al la redakcioj de „Internaciisto", „Sur Posteno" kaj „Nova Epoko" verkojn de junaj aŭtoroj.

Laŭdevene aristokrato (Arnold Vieth von Golssenau), li elektis al si pseŭdonimon Ludwig Renn kaj en 1928 j. aliĝis al la Komunista Partio de Germanio, fariĝis sincera amiko de la soveta popolo. En la sama jaro oni elektis lin sekretario de l' Unuiĝo de Prolet-Revoluciaj Verkistoj kaj redaktoro de la germanlingva revuo „Linkskurve". L. Renn estis ankaŭ konstanta kunlaboranto de „Rote Fahne", organo de la Komunista Partio de Germanio.

La faŝistaj banditoj malliberigis lin en 1933 kaj provis allogi lin por sia imperiisma politiko. Sed Renn restis fidela al sia komunista partio. Dank' al la internacia solidareco oni lin liberigis. Baldaŭ li elmigris kaj en la somero de 1936 aperis en Hispanio kun celo batali por la libereco de la hispana popolo. Dum novembro-decembro de la sama jaro li defendis Madridon kaj en unu voĉo kun la interbrigadanoj kantis:

Madrid', vi urbo bela,
vin venki oni volas.
Pri viaj filoj fidelaj
neniam tamen vi hontos!

Li vere sentis sin filo de Madrido!

Klara oficio, partopreninta la Unuan Mondmiliton, Renn estis enoficigita kiel stabĉefo de la 11-a Internacia Brigado. Li instruis al hispanaj laboristoj la militarton. Lia nomo estas nedisigeble ligita kun la bataliono „Tählmann“ (Telman), kiu sukcesplene batalis kontraŭ germanaj, italaj kaj hispanaj faŝistoj.

Por la fifama „neintervena politiko“, trudita al la Hispana Respubliko fare de Britio kaj Francio, la faŝistoj venkis. L. Renn estis devigita veturi al Meksikio, kie li senmaskigis la akson „Berlino—Romo—Tokio“ kaj jam tiam antaŭvidis la pereon de la germana faŝista imperio. En la malgranda universitaturo Morelia li legis al studentoj lekciojn pri grandaj germanaj humanistoj de la pasintaj jarcentoj.

En 1943 L. Renn aligis al la unuigo de germanaj oficiroj batalantaj kontraŭ Hitler. Post la milito li revenis en sian patrolandon kaj daŭre laboris sur la kampo de belliteraturo. Liaj verkoj por plenaĝuloj kaj infanoj estas legataj ne nur en Germanio.

La bulgaraj esperantistoj kore deziras al k-do Ludwig Renn bonan sanon kaj energion por plua verkado!

ĤRIMA

AGADO DE POLA ESPERANTO-ASOCIO

El „Konciza raporto por 1973“

I. Organizaj aferoj. Oni sukcesis konservi la membrestaton de 3100 personoj, malgraŭ la enkotizigo de „Pola Esperantisto“ kaj enkonduko de jaraj kaj duonjaraj kotizoj pagendaj anticipe.

Por la pli bona programado kaj realigado de la taskoj oni fondis sep konstantajn problemajn komisionojn, kiuj estas helpaj organoj konsilaj kaj opini-donaj de la Ĉefa Estraro de PEA. En 1973 oni plivastigis la personajn kontaktojn de la prezidanto, vicprezidantoj, ĝenerala sekretario kaj kasiĉto kun lokaj grupoj (PEA-Rondoj) kaj estraroj de vojevodiaj filioj de PEA, kio ebligas al la Ĉefa Estraro pli lertan agadon

kun plejeble vasta konsidero de la deziroj kaj postuloj de la lokaj grupoj. Pri la grandeco de la organiza agado atestas la laboro de la oficejo de PEA en Varsovio, kiu akceptis 4953 kaj forsendis 19 222 korespondadojn individuajn, dissendis multobligitajn cirkulerojn kaj diversspecajn informmaterialojn al 27 020 personoj, organizitaj unuoj de PEA, gazet-redakcioj k. a. kun la suma nombro de 168 paĝoj.

II. Informado. Multe da atento oni dediĉis al la plua plintensigo de la intern-organiza informado pere de „Pola Esperantisto“, cirkuleroj kaj pollingvaj informiloj.



En la sfero de la ekstera informado oni daŭrigas la dissendon de nacilingvaj bultenoj al la redakcioj de amas-komunikiloj en Pollando; oni daŭrigas la pli proksiman kontakton kun 10 gazetoj regule aperigantaj informmaterialojn pri Esperanto. Al la pli vasta informado kontribuis ankaŭ la intervjuoj de geaktoroj esperantistoj. Sume en 1973 aperis en la pola gazetaro 3347 informoj, notoj kaj artikoloj pri E-to, inter kiuj 2 artikoloj kaj 47 mencioj pri la UK en Beogrado. Plej multe la gazetaro skribis pri la korespondaj kursoj de E-to kaj pri la sporta konkurso, kiun PEA organizis en ligo kun la futbalmatĉo inter la teamoj de Pollando kaj Anglio pri diveno de matĉorezulto. (Ankoraŭfoje montriĝis, ke por diskonigi Esperanton, oni povas kaj eĉ devas utiligi diversajn aktualaĵojn, kiuj alforĝas la atenton de la vastaj homamasoj).

En la preparolata periodo venis al la oficejo de PEA 15312 leteroj kun demandoj pri E-to kaj la ebloj lerni ĝin. Por kontentigi tiujn demandantojn oni eldonis kaj distribuis 8-paĝan broŝureton pollingvan de A. Pettyn "ABC jezika Esperanto" (ABC de la lingvo Esperanto) en la suma eldonkvanto de 10 000 ekzempleroj).

III. Instruado. Oni daŭrigas la nedevigan instruadon en pli ol 100 diversgradaj lernejoj (precizaj nombroj mankas).

Apartan atenton oni dediĉis al la korespondaj kursoj, kiuj en la tutlanda skalo gvidis nur la Ĉefa Estraro de PEA. Apud la jam funkciantaj I, II kaj III semestroj oni enkondukis la IV-an semestron por progresintoj; en ĉi-lastaj oni instruas al la kursanoj koresponde ĉ. 5000 tipajn frazojn kaj vortojn el la ĉiutaga vivo aranĝitajn laŭteme kaj laŭsituacie. Pri tiaj korespondaj kursoj demandis 15312 personoj, el inter kiuj preskaŭ 4000 jam komencis lerni.

En 1973 pli vaste oni enkondukis la tiel nomatajn eksterĉeestajn kursojn

(personaj konsultadoj kombinitaj kun memlernado kaj korespondaj kontaktoj kun la instruisto). Surbaze de la unuaj observoj oni povas konkludi, ke estonte — konsiderante la kreskantan de jaro al jaro okupatecon de la homoj — oni devus plejeble vastigi ĉi tiun instru-formon.

En 1973 la Ĉefa Estraro prezentis al la Ministerio de Klerigo kaj Edukado kompleksan projekton pri la instruado de E-to al plenkreskuloj, kiun la Ministerio tutece akceptis en la formo de aparta dokumento. Tiu ĉi dokumento, kies suplementon konsistigas „kurso principaro“, faciligos la organizadon kaj gvidadon de E-kursoj al plenkreskuloj en ĉiuj organizaj unuoj de PEA.

IV. Kultura agado. En tiu ĉi afero aparte rimarkindas la turneo de la Pola Esperanto-Teatro je la nomo de Antonio Grabowski tra Usono kaj kelkaj landoj de la okcidenta Eŭropo, dum kiu turneo geaktoroj K. Pienkiewicz kaj Z. Dobrzynski prezentis la teatraĵon „Proksima nekonato“ de A. Scibor-Rylski en la E-traduko de J. Grum.

Krome, valoras substreki tri interesajn prelegvojaĝojn (organizitajn de la Ĉefa Estraro de PEA): de s-ro Nikola Aleksiev el Bulgario, la prezidanto de MEM kaj BEA (li prelegis pri la partopreno de MEM en la Monda Kongreso de la Pacamaj Fortoj en Moskvo kaj pri la agado de MEM ĝenerale), de s-ro Ludwig Schödl el GDR, aŭtoro de konata E-lernolibro (li prelegis pri la junularo en GDR kaj la prelegon akompanis per la E-filmo de GDR „Hieraŭ ni ankoraŭ estis infanoj“), de s-ro Istvan Szerdahelyi, profesoro de la Budapeŝta Universitato (li prelegis pri modernaj instrumentadoj de E-to).

La kultura agado manifestiĝis diversforme precipe sur la ŝtupo de lokaj kaj vojevodiaj filioj, inter kiuj aparte distingiĝis tiu de Bydgoszcz.

V. Junularo. Pli ol 40 junaj esperantistoj partoprenis la TEJO-Kongre-

son en Sarajevo; gejunuloj partoprenis ankaŭ pli ol 30 aliajn aranĝojn kaj ekskursojn eksterlandajn pere de la vojaĝoficejo „Juventur“, kiu plue tre regule utiligas Esperanton en sia laboro. En 1973 substrekindas la agado de esperantistoj studentoj kadre de la Socialisma Asocio de Pola Junularo, kiu i. a. organizis du tutlandajn seminariojn pri instrumentadoj de E-to. La Junulara Komisiono de PEA i. a. entreprenis enketajn esplorojn pri la esperantista junularo en Pollando, kiu devus helpi en la trovado de taŭgaj agadmetodoj en la junularaj medioj.

VI. Turismo. Tre sukcesaj estis la du konstantaj aranĝoj: la III Esperantista Feriado en Miedzyzdroje (17—28. VI. 1973). La junulara vojaĝoficejo „Juventur“ organizis 35 eksterlandajn ekskursojn por polaj esperantistoj. En Szczecin aperis kovertoj kaj leterpapiroj kun turismaj informoj esperantlingvaj.

VII. Aranĝoj. La plej grava — post la menciitaj feriadoj — estis sendube la 18 Tutpollanda Esperanto-Kongreso en Sopot (24—26. IV. 73), kiu pro sia la-

bora karaktero kaj viglaj perkomisionaj kaj plenkonsidaj debatoj helpis ellabori gviddirektivojn por la estonta agado de PEA, kiuj kompletigis la gvidlinion akceptitan dum la landa Kunveno de Delegitoj en Torun (1972). Okazis ankaŭ multaj lokaj aranĝoj, voevodiaj konferencoj k. a.

VIII. Internacia kunlaborado. Ĉefloke estas substrekinda la starigo de proksima kunlaboro de PEA kun MEM.

Plue disvolviĝas la kunlaboro de PEA kun la Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR (intersanĝo de libroj kaj prelegantoj, intersanĝo de spertoj). Oni ankaŭ realigis pli proksimajn kontaktojn kun BEA kaj HEA.

Lastloke, sed ne lastsignife oni akceptu la kontaktojn kun UEA (precipe dum la Kongreso en Beogrado) kaj tute aparte la multflankajn kaj tre utilajn kontaktojn kun TEJO.

Postnoto: Tiu konciza raporto de PEA estis aprobita dum la kunsido de la Prezidio de la Ĉefa Estraro de PEA komence de 1974 jaro.

POEZIO kaj BELETRO

PLOVDIV RIBELIS

Rememoroj de Petr Stoilov — Kaŝilski

La partia estraro de la politikaj mal-liberuloj de Plovdiva Prizono kunsidis. La Urba Komitato de la Komunista Partio proponis, ke ili senprokraste liberigu kaj estu atentemaj kontraŭ provokoj flanke de faŝismo, kiu estis en paniko kaj agonio.

Soldatoj el la gardostara servo rakontis al ni, ke la faŝistaj oficiroj el la najbara 9-a infanteria regimento mi-

nacas mortigi nin en la ĉeloj. La murdisto-kapitano Jeljazko Popvasilev malice kaj cinike anoncis antaŭ ni:

— Vi el tiuj tomboĉeloj ne eliros vivaj. Malgraŭ ĉio ni trovos tempon saluti vin per kelkaj grenadoj.

La faŝismaj kanajloj kapablas je ĉiuspecaj malbonfaroj kaj pro tio ni devis antaŭi ilin.

Ni decidis proponi al la prizonestro



Petrov liberigi nin senbrue kaj ni garantios al li la vivon.

— Mi liberigos vin. Mi atendas „La Ŝtatan Gazeton“... Mi atendas ordonon de la superuloj, de la prokuroro... de la regiona prefekto — senkulpigis la timigita, sed ruza faŝisto.

— Kion vi babilas! — ekkriis unu el ni. — Parolu per telefono kun tiuj sinjoroj, por ke ni aŭdu!

Petrov, pala, kun tremantaj manoj kaptis la proponitan de li telefonaŭdilon. Respondis nek la prokuroro, nek la regiona prefekto. Verŝajne tiuj gardistoj de la faŝismaj leĝoj kaj ŝtato jam estis forkurintaj.

Ni avertis la prizonestron, ke se li post unu horo ne liberigos nin, ni perforte forlasos la prizonon.

Pasis la fiksita horo. En la prizono oni komencis paroli, ke oni liberigos nur la kondamnitajn. Aliaj parolis, ke oni liberigos nur tiujn, kiuj ankoraŭ estas sub juĝesploro.

La maldigna ludo kun la sorto de 300 politikaj malliberuloj eksplodigis nian koleron.

La horloĝo montris la 15-an, kiam pere de la soldatoj-gardistoj — niaj kamaradoj — ni ricevis la ĵurnalon „Volja“, en kiu estis publikigita la leĝo pri amnestio.

Ni kolektigis sur la korto. Antaŭ ĉiuj es'is legata la leĝo pri senkondiĉa politika amnestio kaj la sciigo, ke la Ruĝa Armeo impete antaŭenmarŝas en Norda Bulgario. Fortega „hura!“ ekskuis la nigran inferon. De ekstere, trans la muroj, sin aŭdigis la popolamasoj, kiuj atendis kaj insistis nian liberigon.

Sed oni ne liberigis nin. Male — plimultigis la gardostarajn soldatojn. Kaj okazis miraklo. La gardostarantoj ne direktis la pafilojn kontraŭ nin por minaci nin, sed kuraĝigis nin:

— Rompu la katenojn, kamaradoj! Ni estas kun vi!

— Ni ne pafos kontraŭ vin, fratoj!

— Ni ne permesos al policianoj kaj

faŝistaj kanajloj proksimiĝi al vi!

Ne estis tempo por hezito. Sen komando ni ribelis. Per tabuloj kaj traboj, elprenitaj de niaj komunaj litoj, ni komencis disrompi la kradojn.

Ektondris kantoj kaj frapoj. Fero kaj ŝtono disrompiĝis sub la strebo al libero. La soldatoj donis al ni kelkajn revolverojn kaj grenadojn. Apenaŭ nun, kiam unu soldato kaj nia armita grupo aperis antaŭ la prizonestro kun ultimato tuj liberigi nin, la pordistoj-cerberoj malfermis la grandegan kaj pezan feran pordegon..

Niaj okuloj vidis impŝnan bildon: antaŭ la prizono atendis nin multaj homoj, bolantaj pro malamo al la faŝistaj tiranoj.

Fortegaj laboristaj manoj etendis sin al ĉiu, kiu eliris tra la pordego, kaj kondukis lin for de la ŝtona fortikaĵo. Eksciteco skuis la tutan urbon. De la prizono la popolamaso sin direktis sur la stratojn de la ribelanta Plovdiv. Ni, politikaj malliberuloj, ordigis nin en du kolonoj. La unua kolono sin direktis al la nova ponto, kaj la dua — al la malnova ponto. Ni strebis pli rapide atingi la centron de la urbo kaj, se neeviteble, ataki ĝin de du flankoj. Mi marŝis kun la unua kolono. Sur la vojo ni renkontis, kaj senarmigis kelkajn policianojn. Ili kapitulacis sen ia ajn kontraŭstaro. Iuj el ili proponis al ni siajn komplezojn. Evidentiĝis, ke la malamiko jam morale kapitulacis.

Sur strato „Ferdinand“ (nun „General Zaimov“) nia grupo sturmis la sidejon de la distrikta poliestro. Tie ni konfiskis armilojn. Antaŭ la domo staris alta statuo de aglo kun la emblemo de Hitlera partio. Oni renversis kaj dispecigis ĝin.

Sur la placo Ĝumajata la du kolonoj unuigis kaj tra la ĉefa strato direktigis al la sidejo de la laboristaj sindikatoj.

Antaŭ la sindikatdomo en la nomo de la politikmalliberuloj Georgi Andonov el la proksima vilaĝo Jagodovo

sin turnis al la popolamaso:

— Gekamaradoj!

La placo ekondris per daŭra „hural“ „Antaŭen al la Bastilio!“, „Morton al la faŝismo—liberon al la popolo!“ — kun tiuj sloganoj ekondis la homa maro kaj direktiĝis al la inspekto de la sekreta polico.

Nudmane, sen armiloj, kun brulantaj okuloj laboristoj kaj politik-malliberuloj sturmis la fifaman domon por venĝi niajn viktimojn.

La faŝistoj timigite barikadis la pordejojn.

Iuj, en sia antaŭmorta hore, kuraĝis eĉ pafi kontraŭ nin. Estis vunditaj kelkaj el ni. La gardostarantoj antaŭ la enirejo provis haltigi la popolon.

Sed nenio jam estis en stato devojigi tiun nereteneblan homan lavangon, kiu forbalais ĉion antaŭ si.

La ribelo en Plovdiv eksplodis tutforte. Rapide ni ŝanĝis niajn rolojn.

Faŝistaj kaptitoj antaŭ kelke da horoj, nun ni fariĝis mastroj de la situacio.

La nokto je la 8-a de septembro estis decida por la venko de la libero. La sturmaj grupoj agis rapide kaj lerte. Ĝis la mateno de la 9-a de septembro ĉiuj urbopartoj estis konkeritaj de la ribelinta popolo.

La naŭa de septembro! La mateno estis brila, kiel brilaj estis niaj ideoj!

El la bulgara: Stojan Kostadinov

AL UNU PAFITO

de Veselin Hančev

Mi nun rememoras proksiman formfrapon de pordo kaj poste — pafadon en griza aŭtuna la hor'.

Ĝendarmojn ŝvitplenajn, obtuzan kuradon de hordo ĉasanta vin kiel luparo kun hurla horor'.

Sed kio ekfulmis en via pensad' fajroplena?
Pro kio ridetis kaj kial vi haltis ĉe l' mur'?
Vin celis ĝendarmo, resonis la paf' karabena,
kaj tie sterniĝis en sango vi — juna bravul'.

Agentoj policaĵ kruciris la straton kun ĝojo,
kaj venis doktoro kun leda saketo en man';
li per la piedo vin streĉis sangaŭtan sur vojo
kaj faris la mortprotokolon — doktor'-polican'.

Mi konas ĉi-tiujn paperojn: „Ĉe provo eskapi
murdita. Komunisto.“ Jaro, monato kaj tag'...
En gaja humor' poste ili per brando ŝatata
regalos sin por manifesti per marŝ' en zigzag'.

La pluvo forlavis la sangon. Rebruas la strato.
Germanaj soldatoj insultas en sia ĵargon'.
Ĉe l' strataj anguloj ĝendarmoj postenas en gvato
kaj rampas malalte la nokta mallumo-fantom'.

Sed ĉu vi nun aŭdas el via senkruca tombkavo,
ke venas kun paŝo sonora alia falang'?
Ho kreu: tagiĝas, purpuras l' aŭror', kamarado,
ne falis vi vane, ne vane fluadis la sang'.

El la bulgara: Violin Oljanov



*Omaĝe al la ĉefa memoro
de Dimităr Blagoev²*

De tiu alta pinto monta
li vidis kiel orakol'
la bildon de l' jarcent' venonta
kaj la liberon de l' popol'.

Ankoraŭ est s tamen frue.
Sur la neklara horizont'
leviĝis en minac' senbrue
de la revoluci' la ond'.

Ja junis nia klas' proleta,
sed vidis li potenca ĝin,
batali sinofere preta
sur barikad' ĝis venka fin' ...

Ho, kia aŭdacul', revulo!
Li staris sur la pint' de l' mont'
kun la vizaĝo de saĝulo
kaj kun rigard' al la estont'.

Per pens' penetra li transiris
trans la jarcento de l' subir'.
Kaj tio, kion li eldiris,
fariĝis por la klas' armil' ...

Hodiaŭ gloras la nacio
la vojon, kiun montris li.
Post la triumf' revolucia
majeste staras supro ĉi.

El la bulgara: Tempesto

¹ Temas pri la montopinto Haĝi Dimităr (ekse Buzluĝa) en la meza parto de la Balkanmontaro, kie en 1891 okazis laŭ la iniciato de Dimităr Blagoev la fonda kongreso de la Bulgara Socialdemokrata Partio (poste renomita Bulgara Komunista Partio).

² Dimităr Blagoev (1856—1924) — fondinto kaj gvidinto de la marksisma partio en Bulgario — la plej granda proleta revoluciulo kaj teoriulo de la marksismo en la Balkana Duoninsulo je la fino de la 19-a jarcento kaj la unuan kvaronon de la 20-a jarcento.

JUBILEA (El nia kvartalo)

de Rajna Arnaudova

Al tiuj, kiuj intencas viziti mian domon, mi klarigas: atinginte la benzinstacion, ekiru laŭ strato "Luka Kunin" kaj post 200 — 300 paŝoj vi atingos straton „Ilija Filipov“. Tio estas mia strato. Kun malfermita koro mi aldonas — venu por ĝui la proksiman pinarbaron, la belegajn florgardenojn, la novajn domojn, la novan kvartalon...

Elrinte el mia domo aŭ revenante hejmen, mi haltas antaŭ la korto-pordo de la vidvino de Luka Kunin. Ŝi ŝatas alparoli la samkvartalanajn, demandojn pri ilia farto, vivkondiĉoj. Kaj se la tempo permesas, ankaŭ mi restas kun ŝi kelkajn minutojn por dividi impresojn — pri la moderna nutrajmagazeno, pri la legomvendejo, pri la novekonstruita loĝbloko, similaanta per sia reliefa fasado al belegaj hoteloj en „Albena“ ĉe Nigra Maro, paroli ĝenerale pri ĉio bela, aperinta en nia kvar-

talo. La konversacio iras glate, kaj tamen ĉe la fino la okuloj de Margarita malsekiĝas kaj per apenaŭ aŭdebla voĉo ŝi flustras al si:

— Mia Luka tre ŝatis la belecon...

La jaro nun estas jubilea... la 30-a.

Tra la fenestrovitro de la kvartala klubejo modeste rigardas tri portretoj: de Luka Kunin, Ilija Filipov kaj Stefan Dimitrov. Inter ili plej juna, kun revemaj okuloj kaj delikata ovalo, estas Luka Kunin. Mi scivolemas kaj demandas la edzinon, ĉu la portreto datiĝas longe antaŭ lia pereco.

— Ne, — respondas ŝi, — nur du jarojn antaŭ ol Luka fariĝis partizano.

Eble ŝi rimarkis laŭ mia straba rigardo, ke mi apudmetas la portreton de Luka al ŝi, kaj ridetante aldonas:

— Sed ankaŭ mi tiam, antaŭ pli ol 30 jaroj, estis juna kaj bela... Liaj

okuloj, la okuloj de Luka, tamen estis belegaj. Ili parolis eĉ pli esprimrove ol liaj vortoj... Kiam li devis plenumi ian bataltaskon, liaj okuloj transformiĝis en fajrujojn, kiuj elradiis ne fajron, sed fulmojn...

Mi rigardis ŝin atente kaj demande. Kaj ŝi daŭrigis triste sian parolon:

— Foje li revenis hejme kun tiaj flamantaj okuloj. Mi tuj komprenis: tasko plenumenda. Mia edzina koro premiĝis. Mi volis malfermi buŝon por diri ion. Sed kion?... Mi ja sciis: se la partia grupo komisiis ion al Luka, tion li konsideras pli ol leĝon. Kaj mi preferis diri nenion. Ĉi foje lia mano pli longe karesis la kapon de nia filineto, kaj nia kiso pli ardis, kiel ĉe adiaŭo. Kaj li eliris. Mi restis sola. La bildoj de nia komuna vivo kiel flimbendo pasis antaŭ miaj okuloj... Ĉiam dise... Nur antaŭ du jaroj nia najbaro Ilija Filipov estis proponinta al Luka, se li deziras manĝi trankvilan panon, komenci laboron en fabriko „Furnir“, kies direktoro Kiril Slavov protektas la komunistojn... Subita eksplodbruo kaj aerpuŝo skuis la atmosferon. La granda kablo-instalaĵo, konstruita de la germanoj por malhelpi la aŭdadon de la kontraŭfasisma radiostacio „Hristo Botev“, estis eksplodigita... La proksimaj stratoj kaj domoj kovriĝis de pecoj el falintaj elektro-kaj telefon-dratoj... Sed ĉu kune kun la instalaĵo ne falis ankaŭ Luka kaj lia helpanto Hristo Ŝiŝkov?... Dum mi rekonsciigis kaj pensis, kion fari, la policanoj jam alvenis. Ili ĉiam venis unue al ni ĉe similaj okazoj. Kiam alvenadis la Unua de Majo aŭ okazis sabotaĵo, oni ĉiam arestis Luka. Nun la policanoj furiozis ne nur en nia mizera dometo, sed en la tuta arbaro, serĉis ankaŭ ĉe la najbaro, arestis Ilija Filipov kaj Stefan Dimitrov kaj denove revenis al nia domo, ankoraŭ pli kruelaj pro la malsukceso kapti Luka.

Por ne lasi objektojn flareblajn de policaj hundoj Luka kaj Hristo estis bruli-

gintaj siajn lignoŝuojn kaj laborvestojn en la fornego de „Furnir“, kie ili laboris, kaj direktiĝis al la monto. Ĉiuj suspektoj tamen falis sur Luka kaj li ricevis mortverdikton...

La pezaj rememoroj kaŭzas tikojn sur la vizaĝo de Margarita, tremas la nazloboj, la okulanguloj...

— Kaj ĉu via lasta intervido okazis antaŭ la eksplodigo de la instalaĵo? — mi demandas.

— Ne, Luka aligis al la unua operacia partizana zono, kaj antaŭ ol la taĉmento surgrimpis montosupron Kom, li vizitis sian naskiĝvilaĝon Ĉavdar, kie ni estis kun la filineto, kaj nia triopo pasigis tie du feliĉajn tagojn... Poste ni aŭdis pri la kruela batalo apud vilaĝo Dálgi Dol, poste venis Batulija...

Margarita faris geston:

— Tie pereis via granda esperantisto...

Nevole el mia buŝo elflugis la nomo: — Diĉo Petrov!*

— Jes, la komandanto. Ankaŭ nia bona najbaro Ilija... Luka travivis unu tagon pli. Li pereis la 24-an de majo 1944. Dum la sekvaj jaroj, post la pereado de Luka, mi interesiĝis pri la nomoj de ĉiuj, kiujn kune trafis la morto, tiel diri, pri liaj kunmortintoj...

— Sed vi ja scias, kie estas la pereoloko de via Luka... Kial vi titolas unu el viaj versaĵoj „Nekonata tombo“? En ĝi vi sopiras iri kaj ĵeti florojn sur lian tombon.

— Mia Luka ne restis sur la deklivoj apud vilaĝo Batulija. Unu el niaj amikoj vidis lian kapon fiksita sur paliso ĉe la fervojstacio Svoĝe. Li eĉ kuraĝis karesi la kapon de sia amiko, sed tion li devis pagi per torturoj en la policejo...

La tikojn ne plu tremas sur la viza-

* Vidu pri li la materialo'n en n-roj 5 kaj 6 de „Bulgara Esperantisto“, 1974 j.

ĝo de Margarita. Ŝi estas koncentriginta.
Surprize por mi ŝi diras:

— Ĉu vi povas kredi? Mi konsideras mian Luka tute ne morta. Kaj mi konfidas al li ĉion — kaj ĝojon, kaj ĉagrenon. Tial mi verkas versaĵojn ŝajnas al mi, ke per la versoj li pli bone komprenas min. La versaĵojn mi disdonas al lernantoj, al iuj redakcioj, al tiuj, kiuj volas ilin.

La vidvino de Luka donis al mi kelkajn. Inter ili unu dediĉita al la jubilea jaro...

PARTIA KANTO

de Georgi Ĝagarov

Radias paca lumo,
helegas la lazur'.
Patrujo estas unu,
la vojo — unu nur.

Alvokas nin l' epoko —
al agoj vokas nin,
je ĝia forta voko
batalas ni sen tim'.

Kunuloj, sub standardoj
arigu do kun kant',
kunigu, koroj ardaj,
por nia patroland'.

Centraloj ĉie lumas —
ni faris ilin mem!
Fabrikoj novaj fumas,
maturas ora gren'.

L' aflikton ni detruas
konstante kaj kun vol',
senlace ni konstruas
feliĉon de l' popolo'.

El bulgara: As. Grigorov

MALPROKSIME

de Vätjo Rakovski

Vespere, kiam la radio ludas
kaj vi aŭskultas ĝian melodion,
mi iĝas sono de muziko ĝia,
al vi por povi
diri ion.

Se pluvas, mi fariĝas guto blanka,
al vi mi proksimiĝas malrapide
kaj sur fenestro via mi ekfluas
por povi
vin ekvidi.

Se suno lumas, iĝas mi radio,
sur via vitro flamas sinforgese,
eniras ŝtele-ŝtele vian ĉambron
por povi
vin karesi.

Nur tiel povas mi kun vi paroli,
nur tiel povas vidi vin anime,
karesi tiel vin, ĉar vi, ho kara,
troviĝas
malproksime.

El la bulgara: Asen Grigorov

HENK

de Ljuba Bojaĝieva

En unu el miaj multnobraj vagadoj tra la mondo mi renkontis lin hazarde sur la ne tre granda itala ŝipo „Enotria“, kiu veturis al Eŭropo revenante el haveno de Azio.

Dum tiuj kelkaj tagoj la Mediteraneo, aparte rava pro siaj inke blauj,

kristale puraj kaj kvietaj akvoj, allogis la pasaĝerojn eksteren. Ili ĝuis la vastcon de la spegule glata surfaco, sur kies horizonto aperadis unu post alia verdaj insuletoj. Sekvante vice unu la alian, en la malproksimo ili aspektis kiel giganta smeralda koliero sur la



ĉarma kolo de iu fabela mara belulino.

Tamen tiu belega bildo, la mevoj, kiuj persekutis kun krioj la ŝipon, kaj la blankaj, lanuge pufaj nubetoj, disŝutitaj sur la blua firmamento, baldaŭ fariĝis enuigaj al la plimulto de la vojaĝantoj. Ili jam trovis la bildon monotonan kaj iom post iom komencis kolektiĝi en la ripoza ĉambro de la ŝipo.

Tre rapide tamen tiu ĉambro alformiĝis en Babelturon pro la plej diversaj lingvoj, kiuj aŭdiĝis en ĝi. Plejparte oni distingis la malmolajn sonojn de la angla, ofte aŭdiĝis la pece ŝiritaj frazoj de la germana, iom malpli — la eleganta franca lingvo, kaj de tempo al tempo estis prononcataj la molaj dolĉaj sonoj de la rusa kaj itala. Ne mankis ĉeĥa, serba kaj bulgara interbabiladoj.

Mi eksidis en angulo de ĉambro kaj kun intereso observis la buntecon de la pasaĝeroj, ĝuante la fragmentajn parolojn, kiuj atingis min.

Inter la parolantoj plej ofte sonis la voĉo de Henk, viro ĉirkaŭ tridekjara, blonda, maldika, kun grizebluaj okuloj kaj hela, sed nun pro la suda suno iomete bruniginta haŭto, kian havas nur la nordaj popoloj.

Posedante bone anglan, germanan, hispanan, italan kaj aliajn lingvojn, li senĉese turniĝis dekstren kaj maldekstren kaj alparolis ĉiujn ĉirkaŭe.

Okazis tiel, ke ĉe la manĝotablo mi troviĝis apud li kune kun tre maljuna, sed tre simpala hungara paro. La edzo posedis iomete italan lingvon kaj alparolis Henk'on. Kiam fine ili amb-aŭ ĉesis konversacii, ekestis malagrabla silento, dum ni ankoraŭ ne estis finintaj la vespermanĝon. Eble pli pro deziro interrompi ĝin ol pro ia intereso, Henk fine sin turnis al mi kun la ordinara demando, ĉu mi parolas anglan lingvon. Recivinte mian nean respondon, li demandis plu:

— Eble germanan?

Denove sekvis nea respondo.

— Ĉu ne la francan?

Ankoraŭ foje sekvis nea respondo. Henk ĉesis demandi. Versajne li perdis intereson pri tio.

Post la vespermanĝo ĉiuj pasaĝeroj rekollektiĝis en la ripozĉambro por iomete interbabilii antaŭ la dormo. Rapide formiĝis kompanio, meze de kiu Henk trovis sian naturan lokon kaj koncentris sur sin la atenton de la ceteraj. Denove li starigis la konstantajn demandojn en siaj multnombraj lingvoj, kaj ricevinte jesajn respondojn, rekomencis laŭte konversacii.

Fine, versajne pro distro aŭ, pli prave, pro forgeso, ke li ĵus demandis tiun per nenio rimarkindan virinon, li returnis sin al mi per siaj tedaj demandoj:

— Ĉu vi parolas anglan lingvon?

— Eble germanan?

— Aŭ hispanan?

— Ĉu eble italan?

Mi ne plu povis toleri. Incitita de lia fanfaronado, kolera pro lia malatento, en la ekestinta paŭzo, tute firme kaj klare, emfazante ĉiun vorton, mi respondis:

— Mi parolas nur Esperanton!

En la sekvinta longa silento mi rimarkis, ke la rigardoj de ĉiuj vojaĝantoj sin turnis al mi kun ia aparta scivolo, eĉ miro, kiu iom post iom transformiĝis en estimon.

Apenaŭ tiam, en tiu ne tre granda ŝipo, meze de pasaĝeroj parolantaj plej diversajn lingvojn, mi eksentis, kiom grandan intereson vekas en la spiritoj de la homoj la vorto „Esperanto“.

Tamen la ŝanĝo, kiu ekestis ĉe Henk post mia respondo, estis por mi ege surpriza.

La unuan momenton li larĝe malfermis la okulojn, kiuj malantaŭ la tridiotraj okulvitroj aspektis ankoraŭ pli grandaj. Dum kelkaj momentoj li rigardis min fikse, kvazaŭ por la unua fojo rimarkis min. Poste eksaltis al mi kaj per amike varma rideto apenaŭ povis elparoli:

— Esperanton?!.. Vi parolas Espe-

Se nokto septembra tenere vualas
montpintojn, arbustojn kaj densajn arbarojn
elsub monument' partizana elkuras
homombro kaj iras per paŝoj veluraj.

Al ĝi ja ne pezas homkarno kaj ostoj —
facile ĝi glitas tra valoj kaj montoj.
Ĉe Vaĉa-rivero ĝin bildoj impresas:
baraĵoj purakvaj, centraloj elektraĵ.

Lasante la montojn al kampo trakia
pluiras la ombro kaj vidas ĝi plie:
kanaloj trafluas senlimajn ĝardenojn
kun pomoj, vinberoj kaj piroj sukcesaj.

Ho, kiom volonte la ombro gustumus
la fruktojn mielajn! Sed mankas la buŝo —
ĝin iam frakasis faŝista mitralo
dum peza batalo en neĝa montvalo ...

Pasante trakiajn urbetojn, vilaĝojn
la ombro admiras la belkonstruaĵojn,
en kiuj dormadas geviroj, infanoj
kaj sonĝas verŝajne pri festo morgaŭa.

Ho, kiom volonte la ombro karemus
dormantan en lito-lulilo nepeton!
Sed mankas la karno de man' partizana—
ja ĝin forkonsumis la vermoj montaraj. . .

La steloj ekpalas sur la firmanento.
La ombro revenas kun plena kontento,
ĉar rev' partizana pri bono popola
ja paŝo post paŝo fariĝas reala!

anton?!... Vi estas esperantistino?!..

Kaj li etendis manon kaj elkore
salutis min, prenante la mian.

De tiu momento Henk ne disigis de
mi kaj ĉiam postulis, ke mi parolu en
Esperanto.

Komence mi ekparolis ŝanceliĝeme,
kun certa timo, opiniante, ke mia Espe-
ranto ne estas sufiĉe flua kaj eleganta
por konversacii kun tia sperta poligloto.
Evidentiĝis tamen, ke li posedas la
lingvon tute malbone kaj malkorekte,
kio trankviligis min.

La sekvan tagon ĉe la matenmanĝo
Henk aperis kune kun malgranda blue
bindita angla-esperanta lernolibro, kiun
li kunportis en sia valizo.

Apenaŭ ĝisatendinte la finon de l'
matenmanĝo, li kun granda senpacienco
kaj samtempe kun aparta fiero montris
al mi la sepan lecionon, ĝis kiu li
estis atinginta en sia lernado. Subigita
de lia arda peto, mi akceptis instrui lin.

Kaj ni komencis labori diligente ...

La vetero estis konstante belega. La
blubluaj maraj ondetoj kantvoĉe fra-
petis la ŝipon, post kiu la mevoj daŭ-
re svarmis senlace kun gajaj krioj.

Sur la ĉielo la petolaj nubetoj formis
plej mirindajn figurojn, kiuj amuzis la
veturantojn. Oni sentis sur siaj vangoj

la velure mildan kareson de la kris-
tale freŝa aero. Ĉiuj vojaĝantoj estis
sur la ferdeko kaj observis la neripe-
teblan, praan belecon de tiu edeno.
Sed ni, la du esperantistoj, nenion vi-
dis, nenion aŭdis, nenion rimarkis, nur
diligente laboris, laboradis ...

De tiam ni — la maljuna bulgara
virino, kaj Henk — la juna viro el Ne-
derlando, kiuj hazarde renkontiĝis sur
la itala ŝipo en Mediteranio, fariĝis
bonaj, karaj geamikoj.

Estis tre agrable por mi vidi, kiel
liaj grizaj inteligentaj miopaj okuloj de
nordano estiĝas pli kaj pli seriozaj,
atentaj, dankoplenaj.

La vojo tamen proksimiĝis al sia
fino. Ĉe la disiĝo Henk prenis mian
manon kaj tute serioze diris:

— Mi skribos al vi, nepre ... kiam
mi ekposedos Esperanton tiel bone,
kiel vi!

Kaj li rapide malproksimiĝis.

Longe mi rigardis post lin kaj kune
kun ia malĝojo, kiu neatendite invadis
mian animon, mi eksentis klare tla
ĝojon, ke Henk estas senrevene altirita
al Esperanto. Kaj mi, kaj mia patrolan-
do gajnis ankoraŭ unu bonan kaj sin-
ceran amikon.

FATIMA
de Ljuba Jekova

La helaj radioj de la libereco penetris tra la nuboj de la malklereco, kiu dum centjaroj premis la logantaron de la mirinde bela Rodopi-Montaro. En sennombraj montosulkoj sin kaŝas etaj vilaĝoj. Ĉi tie la popolo estas bonanima, honesta, sed malklera kaj primitiva. Iam la turkoj perforte mahometanigis ilin. Rodopanoj akceptis la islamon kaj fariĝis tre fanatikaj en sia nova kredo, sed gardis pura la bulgaran lingvon.

Post la Naŭa de Septembro¹ kun la veno de la popola sociordo venis ankaŭ la klereco. Oni malfermis lernejojn. La scio vastigis la horizonton antaŭ la gejunuloj. Ektremis iliaj koroj kiel birdetoj en kaĝo, reviviĝis la revoj kaj la impeto al nova vivo.

Fatima estis juna kaj sciema knabino. Ŝi arde deziris daŭrigi sian lernadon en la urbo. Sed la mahometana leĝo estas tro severa por la virinoj. Kiam la knabino atingis la aĝon de dekdu jaroj, oni metis sur ŝin la turkan mantelon, sub kiu mortas la revoj pri lernado, pri novaj horizontoj.

Fatima bone konis sian severan kaj fanatikan patron. Li neniam permesas al ŝi daŭrigi la lernadon. Ŝi devis resti senrajta en la hejmo, kiel ĉiuj knabinoj, devigata nur naski kaj labori.

Iun vesperon la patro rehejmiĝis gaja. Fatima kuraĝiĝis kaj kun larmoj en la okuloj petis lin:

— Paĉjo, tutan vivon mi estos danka al vi, permesu al mi daŭrigi la lernadon en la urbo.

Tuj tiu kruda kaj rigora montarano kuntiris la brovojn kaj furioze diris al ŝi:

— Estas sufiĉe por knabino scii teksti, kuiri kaj fari la aliajn domlaborojn. Mi jam fianĉiĝis vin, kaj vi devas edziniĝi. Se vi ankoraŭfoje ekparolos pri lernejo, mi mortbatos vin!

Kaj eliris el la ĉambro.

Fatima duonfalis. Ŝi estis konsternita, ŝiaj esperoj fiaskis kaj ŝi ekploris amare. Sed ploro ne helpas. Ŝi viŝis siajn ruĝajn pro la ploro okulojn kaj enpenis.

Kiam la nokto kovris la teron per sia nigra vualo, Fatima silente, singarde eliris el la domo...

La luno sin kaŝis malantaŭ granda nuboj, kiam la emociita knabino ekiris al la densa arbaro. Ŝi konis bone ĉiun vojeton, sed la mallumo transformis la arbojn kaj la ŝtonojn en monstrojn pretajn sin ĵeti sur ŝin. Ŝia koro batis pro timo ĝis kredo, la kruroj fleksiĝis pro laciĝo, sed ŝi rapidis. Konante tre bone sian patron, Fatima ne dubis, ke li mortigos ŝin, se li ŝin atingos. Ŝia agmaniero estis neordinare kuraĝa kaj nekonata ĝis nun en la montaro...

La arbaro estis malantaŭe. Fatima iris laŭ

la ŝoseo, kondukanta al la urbo, en kiu ŝi ankoraŭ neniam estis. Nur aŭskultis pri ĝiaj larĝaj stratoj kaj altaj domoj. Kaj nun, kiam ŝi vidis en la malproksimo la konturojn de la urbo, ŝia koro ektremis. Kien ŝi iras, al kiu? Ŝi ja konas neniun tie. Por momento Fatima ekdeziris reveni, sed rememoriginte pri la nekonata fianĉo kaj pri sia furiozanta patro, ŝi denove sin urĝis antaŭen. Ŝi kredis, ke en la urbo estas bonkoraj homoj, kiuj helpas ŝin. Ŝi estis preta labori kaj lerni, sed neniam reveni al la vilaĝo.

Kune kun la unuaj sunradioj la knabino eniris la urbon. Ŝi iris en duondormanta strato ĉiam antaŭen. Nenion ŝi vidis, nenion ŝi aŭdis. Ŝiaj kruroj moviĝis aŭtomate. Subite ŝi ekkriis kaj falis teren. Amasiĝis homoj, kiuj provis helpi ŝin. Ŝia kruro estis rompita. Venis la hospitala aŭto kaj oni ŝin transportis al la malsanulejo. Dum la tuta vojo ŝi ploris pro doloro kaj timo. Kion ŝi faros? Kiel ŝi eliros el tiu ĉi situacio? Ŝi tre bedaŭris pri sia nepripensita agmaniero. Ho, kiel ŝi deziris nun vidi sian patron kaj eĉ sian furiozan patron!

Sekvontage Fatima kuŝis en blanka hospitala lito kun gipsita kruro. Ŝi plorsingultis, rakontante al la juna kuracisto pri ŝia forta deziro lerni en la urbo kaj pri sia fanatika patro, kiu ne permesas tion. En tiu momento la pordo malfermiĝis kaj en la ĉambron eniris la patro mem. Timigite Fatima ekkriis. La patro estis kolerega kaj preta mortbati sian filinon.

— Ĉu vi ne hontas? — li kriis. — Vi senhonoris mian domon. Mi mortigos vin por viŝi for la hontegon!

La kuracisto apenaŭ sukcesis sidigi la patron kaj lin trankviligi. Ŝi longe parolis kun li kaj fine diris, ke la scio estas kiel suno, kiu lumigas nian vivovojojn. La plenaĝaj homoj ne havis kondiĉojn por lerni, sed nun nia popola ŝtato helpas la junulojn lerni kaj vivi bone.

La patro enpenis. La kuracisto prudente parolis. Sed kion li diros en la vilaĝo, al la hoĝo²? La ago de Fatima estis grava, ekskluzive grava impertinentaĵo por juna mahometano. En lia animo luktis la fanatikeco kaj la prudento. La kuracisto sentis tion kaj milde diris al li:

— Ne timu, ĉio bone finiĝos.

La patro rigardis al sia ploranta filino, svingis la manon kaj diris:

— Bone, daŭrigu la lernadon!

¹ La Naŭa de Septembro (1944) — tago de liberigo de la bulgara popolo elsub la jugo de la faŝismo; nun — nacia fasto.

² Hoĝo — mohametana pastro.



LA ĜOJO DE LA VIVO
de Venceslav Konstantinov

La homo fleksas la arbustojn
kaj penas fari l' universon
loĝebla,
penas planti vegetaĵojn, bredi bestojn,
volas poste halti kaj iom ĝoji ...
Sed el la sablo de l' altaĵoj
rivero fontas —
ŝprucas klara kaj malvarma akvo,
en ĝia lumo sin spegulas viro,
okulojn levas li kaj kantas.

Sunaj gutoj fluas
sur la trunkoj de la arboj.
La ĉielo blovas, nubo spiras —
antaŭ la fonto sub la foliaro
apogas sin virino —
herboj trinkas la humidon,
ŝvelintan el ŝia brusto.
Sed en ŝia sino flirtas birdo —
la plumojn ĝi glatigas, ĉirpas —
la viro hele ridas, pelas ĝin per manoj.
La duo longe restas en la herbo
per unu guto vina en l' okuloj
kaj puraj vortoj sur la lipoj.

— — — — —
Fatima, bela kaj svelta, sidis en la luma ĉambro kaj konversaciis kun juna patrino, kiu premis sur sia brusto etan bebon. Tiu estis zorgoplena kaj atente aŭskultis la konsilojn de la akuŝistino.

Estis pasinta jam preskaŭ unu jaro, de kiam Fatima revenis al sia vilaĝo kiel akuŝistino. Komence la severa mahometana leĝo ne permesis al la junaj patrinoj viziti ŝin kaj profiti ŝiajn servojn. La maljunaj virinoj rigardis ŝin kiel krimulinojn kaj ofte batfermis la pordon sub ŝia nazo. Oni ofendis ŝin kaj nomis ŝin herezulino, mokis ŝin pri ŝia vestaĵo, ĉar ŝi delonge estis formetinta la turkinan mantelon. Fatima arde deziris helpi al siaj kunfratinoj, sed kiel ŝi povus rompi la centjarajn antaŭjuĝojn? Antaŭ ŝi staris malfacila laboro. Sed ne timante ĝin, ŝi komencis viziti siajn amikinojn, kiuj jam estis edzinoj kun beboj aŭ gravedulinoj. Fatima konsilis ilin kiel pli bone flegi siajn bebojn. Kun granda pacienco ŝi venkis ankoraŭ multe da obstakloj kaj malfacilaĵoj, neniam malesperante.

La semon de la klereco ŝi ĵetis konstante kaj rikoltis sukceson. Iom post iom la junaj patrinoj komencis serĉi ŝiajn konsilojn kaj ĉe komplika kazo veni al ŝia laborĉambro. Tiam Fatima ne ŝparis la vortojn, sed montris sur grandegaj bildoj la homan korpon kaj klarigis la funkciojn de la diversaj organoj. Tio multe helpis al ŝi, ĉar tie la junaj patrinoj pli bone komprenis ŝin. Ili ne plu naskis en la stalo, ĉe

la brutoj, sed iris al la domo de Fatima, kiu patrine flegis ilin. Kaj la infanoj ne plu mortis. Kun obstino kaj persisto Fatima venkis la antaŭjuĝojn, kaj ŝia vivo fariĝis pli rankvila. Ŝi gajnis la konfidon de la tuta vilaĝo. Eĉ la avinoj komencis rigardi ŝin kun estimo.

Precipe oni tre miris, kiam la leterportisto komencis porti al ŝi leterojn el diversaj landoj. Tiu novaĵo disvastiĝis eĉ ekster la vilaĝo kaj lumigis Fatima kiel fabelan estaĵon.

Ĉiuj ekdeziris scii ion pri malproksimaj landoj kaj pri iliaj popoloj. Fatima kun plezuro montris al ili bildkartojn kaj legis leterojn. Tiuj simplaj loĝantoj de la monto, por kiuj la tuta mondo konsistis el la proksimaj vilaĝoj kaj la vastaj pinarbaroj, estis tre mirigitaj de la belaj kaj grandaj urboj, kiujn ili vidis sur la bildoj. Fatima rakontis interesajn okazintaĵojn el la tuta mondo, klarigis, ke Esperanto, la lingvo, en kiu ŝi korespondas, estas tre facila. Tiam grupo da junuloj ekdeziris lerni tiun ĉi lingvon de amikeco kaj paco inter la popoloj. Baldaŭ la leterportisto apenaŭ sukcesis disporti al la junaj esperantistoj la leterojn venantajn el diversaj partoj de la terglobo.

La verda stelo ekbrilis en la Rodopi-Montaro, kaj ĝiaj radioj ligis la malgrandan vilaĝon kun la ekstera mondo.

Fatima estis kontenta kaj feliĉa. Ŝi venkis la centjaran monstron, kiu premis la menson kaj la animon de la simplaj homoj. La klereco disradiis kaj dispelis la nigrajn nubojn de la malklerco kaj la fanatikismo.

ALTAROJ
de Ivan Rudnikov

Fieras la planedo pri siaj montaroj.
Ili altigas la altarojn
de siaj krestoj kaj montpintoj,
ili sin vualas en la nebuloj
de la matenvaporo
kaj malobeema — kronite de nuboj —
en la minutoj antaŭ ŝtormo.
La mondo havas siajn Montojn Blankajn
de la kuraĝo kaj heroaĵo,
de la spirito — sian Kilimangaron,
de l' malobeemo —
la tondro-uraganan Evereston.
Nokte la steloj prilumas
per sia kunsento ĉiela
la kapelosimilajn kavernojn
silentigantajn en angoro ermita.

Ne haltas la arbaroj —
verdkaskaj pilgrimantoj —
en sia procesio
al la montopintoj supren.

Riveroj, maroj, oceanoj

ne povas en basenojn siajn
ampleksi
la neverŝitajn larmojn
de l' funebranta Tero-Patrino.

La vento
per akordoj basaj
de funebranta kaj multvoĉa orgeno kantas
la baladan simfonion de l' jarcentoj.
Ĝi flugas alte kaj vastege
al ĉiuj galaksioj
admirante la fulmjetantojn,
la kuraĝulojn, kiuj detruis
la eŝafodojn de la tiraneco,
la bastilojn de l' spiritosufokantoj,
la barlojrojn de la okupantoj,
admiras ĉiujn, kiuj atingas la konstelaciojn
de la lumo.

Fieras la planedo
en sia amo al la homoj
per la altaroj de la libereco!

El la bulgara: Hristo Gorov

LETERO

Kara amikino el Krakovo,

Vi volas, ke mi rakontu al vi ion
pri mia amata patrolando. Kun plezuro
mi faros tion.

Mia patrujo estas belega por mi, kiel
la via por vi. Por ĉiu homo lia patrolando
estas plej bela en la mondo.
Pro tio mi estas ĉiam feliĉa, kiam mi
supreniras iun el niaj montaroj aŭ kiam
mi veturas per aŭto aŭ per vagonaro
tra niaj valoj, kie fluas bruaj riveroj.

Nia lando aspektas kiel ĝardeno,
kiun flegas nia laborema popolo.

Vi volas viziti nian landon kaj vi demandas
en kiu sezono estus plej bone
fari tion. Mi respondas: en ĉiuj!

Vi povas veni vintre, kiam ni ambaŭ
iros al nia belulino Vitoŝa aŭ al alia
monto. Ĉie vi vidos multnombrajn turistojn:
junajn, maljunajn, infanojn. Ĉiuj estas
gajaj. De la freŝa aero kaj suprenirado
la vangoj estas ruĝaj, la okuloj ridetas
afable al ĉiuj. La pura neĝo brilas
kiel diamanto sub la sunradioj.

Iuj marŝas, aliaj glitas per skioj, per
glitveturiloj. Oni falas, levigas. Oni
aŭdas kriojn: „Pista-a-a!“¹ Kaj ĉiuj
gaje ridas.

Se vi volas, vi povas veni printempe.
Tiam vi vidos nian tutan landon
floranta. Se vi iros al niaj senfinaj
pomĝardenoj, vi de kilometroj sentos
la aromon de iliaj floroj.

Sed se vi volas enspiri la ravan
aromon de la rozoj, mi kondukos vin
al la Roza Valo. Tie vi sentos la tutan
aeron plena de parfumo.

Se vi volas veni en la somero, vi
vidos sur la branĉoj frue maturigintajn
fruktojn — ĉerizojn, abrikotojn, acid-
ĉerizojn, persikojn, pomojn, pirojn...
Kaj sur la tero — dolĉajn melonojn,
akvomelonojn...

Ni povus iri al la Nigra Maro por
promenadi sur niaj oraj sabloj. Vi
povus bone sidi sur la rokoj ĉe la maro.

¹ Kurejoni



bordo kaj aŭskulti la senfinan fabelon de la ondoj.

Kaj se vi volas enspiri la freŝan aeron de niaj montoj, ni povus fari ekskurson al Rila, al Pirin. Tie vi povus suriri rokajn pintojn, sub kiuj kuŝas bluaj lagoj. Aŭ ekskursi al la malnova Balkano — patroprotektanto de nia popolo, aŭ al Rodopi-montaro — ĉarma angulo de la antikva legendo — Orfeo ...

Fine, vi povas veni aŭtune. Ni veturos per aŭtobuso aŭ vagonaro kilometrojn kaj kilometrojn longe preter vitkampoj, superŝutitaj de maturigintaj sukcenkoloraj vinbergrapoloj. Aŭ vi vidos maron da heliantoj. La venteto balancas la pezajn surtojn de iliaj florkapoj. Laboremaj abeloj zorgeme traŝercas ilin kaj eligas nektaron per siaj suĉiloj.

Sed vi volas iri ankaŭ al niaj legomĝardenoj? Jes, tie vi vidos eliran-

tajn el ili kamionojn, ŝarĝitajn per tomatoj, kapsikoj, melongenoj, karotoj kaj aliaj legomoj, kiujn oni transportas al urboj kaj vilaĝoj aŭ al eksterlando.

Turniĝu al kiu ajn flanko de nia lando — ĉie viaj okuloj ĝuos maturajn fruktojn kaj legomojn. Kaj vi ne nur ĝuos rigardante la fruktojn, sed vi povus ankaŭ gustumi, manĝi ilin. Kaj vi vidos, kiel bonaj ili estas, maturigintaj sub la suda suno.

Do, kara amikino, mi sincere diras al vi:

— Vi mem laŭplaĉe elektu la sezonon kaj venu al nia bela lando. Mi akceptos vin kun ĝojo. Kaj ĉiuj miaj samlandanoj — ankaŭ.

Nevena Nedelčeva

P. S. Mi ne povas tie ĉi priskribi nian teknikan progreson — tio estas ampleksa tasko, sed kiam vi venos ĉi tien, vi surloke propraokule vidos ĉion

FAGO KAJ FUNGOJ

Fablo de Simeon Ĉirpanliev

Sur plata sterkejo en maldensa arbaro ĝermis post varma pluvo aro da fungoj. Ili estis etaj, malaltaj, sensignifaj estaĵoj, sed en iliaj malgrandaj kapoj naskiĝis megalomaniaj pensoj. Kaj ili komencis detale kaj profunde diskuti pri la senco de la vivo, pri la limoj de la granda arbaro, kie ili aperis, kaj kun bruo difini, kio estas beleco. Ĉiu pli granda fungo kolektis ĉirkaŭ si fungan kapetaron.

La fungaj grupoj komencis senindulge persekuti ĉiun nefungan idealon.

Kaj ĉiu pli saĝa fungo konsideris sin pontifikiko de la suno kaj asertis, ke la suno distingas ĝin per krono de longedaŭra gloro kaj jarcenta vivo.

Jes, preskaŭ ĉiu fungeto estis geniulo inter sia eta popolo.

Inter tiuj saĝaj fungoj foje aperis stranga fungeto de alia gento. Tiam la plej malhumilaj fungoj komencis

laŭte moki ĝin.

— Rigardu, ĉiuj rigardu tiun ĉi degeneridon, kiu havas trunkon kiel vera pajlero kaj kapon el du verdaj plumetoj. Malfeliĉa fungeto, malbelulaĉo, vi estas ludo de la naturo, ĝia amuzilo. Nia patro, la Suno, mortigos vin per siaj unuaj fortaj radioj.

Sed tiu ĉi nova fungo ne diris eĉ vorteton kontraŭ la moko. Ĝi pensis nur pri sia radiko kaj pri la sukoj de la grundo, kie ĝi estis elteriginta.

La naturo sekvas siajn leĝojn. Post la pluvo venis longa senpluveco, kaj la funga popolo forvelkis, pleniĝis de vermoj kaj mortis. La ridinda fungeto kun kapo el du verdaj folioj, varmigitaj de la sunradioj kaj nutrata de la sukoj de la hejma grundo, ornamis sin per tufo da folioj. Kaj post longa vico de jaroj ĝi fariĝis belstatura fago.

(Sur la III kovrilpaĝo)

LA LUMTURO
de Ivan Vazov

Ĉu stel' briletas ĉe la horizont' ?
Ĉu fajr' paŝtista apud roka muro ?
Ĉu flam' de lum' vaganta tra la mond' ?
Lucern' en iu tempo sur la mont' ?
Amikoj, jen lumturo !

La nokto nigras, kreskas la malhel',
samkiel hom' sen kredo kaj kulturo.
La ŝipo naĝas en kaos' al sia cel'
laŭ sia voĵ' tra nigra nokt' sen stel'
briletas nur lumturo !

Ĝi jen sin kaŝas post la nigra bord',
jen reekbrilas gaja, ĉiam kara —
ĝi kaŝas sin kaj jen — konfuz', malord',
ĝi reaperas kaj — kuraĝ' kaj fort' —
pli kara, pli bonfara !

Espero, en obskura viv' — lumtur' !
En hezitanta koro — lum' lanterna,
kompaso, stel', gvidanto de l' kultur',
lumigu nin dum nia vivvetur',
ho vi, lumtur' eterna !

El la bulgara: Simeon M. Simeonov

KANARIO
de Dobri Jotev

Ĉar el mia gorĝ' talenta
ŝprucas kant' liberosenta,
oni tenas min sen sun',
min en kaĝo ŝlosas nun.
Estas akvo kaj paneroj,
estas for de mi danĝeroj.
Sed konsumas min la kaĝ',
arboj mankas, kampverdaĵ' ...

Ene saltas mi konstante
ĉiufanken baraktante,
se ekdormus, songas nur
vivon meze de l' natur'.

Oni estas strangaj vere:
„Kantu kantojn vi liberajn!“
Sed
kiu kantis ja kun plaĉ'
tutlibere en la kaĝ' ?

El la bulgara: Ivan Dobrev

Rimarko: La aŭtoro estis dum kelkaj jaroj
en faŝista malliberejo.

VERDAJ STELETOJ

PASERA KANTO
de Ljuba Bojaĝieva

Ĉio floras, gaje estas,
la printempon oni festas.
De mateno ĝis vespero
kante ĉirpas la pasero:
Ĉik-ĉirik, ĉiri-lik,
ĉiri-ĉiri-lik.

Flugas muŝo, flugas kulo —
en la bekon de l' ĉasulo.
Sata, vigla dum somero
gaje ĉirpas la pasero:
Ĉik-ĉirik, ĉiri-lik,
ĉiri-ĉiri-lik.

Ne plu lumas varma suno ...
Pluvas ... Venis jam aŭtuno.
Vento blovas kun kolero,
triste ĉirpas la pasero:
Ĉik-ĉirik, ĉiri-lik,
ĉiri-ĉiri-lik.

Vintro regas. Malvarmigas.
Ĉio frostas, glaciigas.
Sopirante pri panero
plore ĉirpas la pasero:
Ĉik-ĉirik, ĉiri-lik,
ĉiri-ĉiri-lik.

Solvo de la enigmoj en n-ro 3—4

ENIGMO

Horizontale: Notkajero.

Vertikale: 1. Nokto. 2. Tanko. 3. Amiko.
4. Ezoko. 5. Onklo.


KRIPTOGRAMO

Ĉu vi amas min?

Se vi floro estus,
rozo estu ora,
se monato estus,
majo estu flóra.

Se vi volas esti
amikino mia,
do vi devas resti
ĝis la fino tia.

Marin Băceŭ



VIZITKARTO

Kostov J. A., str. Emona 7 (sep.)

Post sukcesa alilokigo de la literoj vi divenos la ŝatatan lagadon de la persono kaj la urbon, en kiu i loĝas.

M. B.

Ĝi etendis belan branĉaron kaj kreis ĉirkaŭ si bonfarantan ombron kun sunmakuloj.

Sub la faga filigrana ombro ofte elteriĝas multaj generacioj de diversaj fungaj gentoj, iuj venenaj kaj malicaj, aliaj nevenenaj, sed malbongustaj. Unuj atakas la fagon, ke ĝiaj radikoj suĉas la sterkon donitan de la fungaj mortintoj kaj diras, ke ĝi, la fago, pro tio estas tiom forta. Sed la fago fiere altiĝas, ridetas ironie kaj diras:

— Mi nutras min per la sukoj de la plej profundaj tavoloj de la grundo. Kaj mi diras al vi, malsaĝe fieregaj fungetoj: dum sia mallonga vivo diversaj serĉantoj de oro kaj gloro similas al vi. Ili kreskas, vivas, envias kaj atakas la verajn talentulojn kaj kreantojn de valoraj kaj beleco en la vivo.

KRUCVORTENIGMO

Horizontale: 2. Ordigi per ilo la hararon 7. La unuaj du silaboj el la nomo de antikva greka verkisto, historiisto kaj sociaganto (430—354 j. antaŭ nia erao). 9. Signo sur la muzika liniaro. 10. Batilo konsistanta el ŝnuro aŭ rimeno alligita al tenilo (rad). 11. Antaŭe nekonnata (rad.). 13. Adjektivo formita el prefikso. 14. Nombro. 15. Sufikso. 17. Poseda pronomo. 18. Iĝi seka (sen finaĵo). 20. Nombro. 22. Gaso kun forta sufokaodoro (adjektivo). 23. Tri literoj (vokalo kaj konsonantoj). 24. Ankoraŭ ne fermentinta suko elpremita el vinberoj.

Vertikale: 1. Tagnokta egaleco. 2. Kvarobla ŝtofo. 3. Sufikso, per kiu oni formas la frakciojn. 4. Iĝi videbla aŭ evidenta (prezenco). 5. Perforte eniri en fremdan landon. 6. Maniero, laŭ kiu estas kunarangitaj la diversaj partoj de konstruo, maŝino aŭ la diversaj eroj de kemia substanco. 8. Resenda pronomo. 12. Multvalora flava metalo (rad.) 16. Eksalti al rapida kurado aŭ simple al foriro (rad.). 17. Antikva korda muzikilo. 19. Interpunkcia signo. 20. Greka prefikso signifanta „nov“. 21. Sufikso de pasiva participo.

Post korekta solvo de la enigmo vi legos diagonale (1) la nomon de amata lingvo.

Petro Stoichkov

TRA LA GAZETARO

En la semajna ĵ. „Uĉitelsko Delo“, organo de la Unuiĝo de la Instruistoj en Bulgario (9. IV. 1974): reklamo pri la Someraj porinstruistaj E-kursoj kaj E-seminario en u. Burgas, (5—25-a de aŭgusto ĉ. j.).

En ĵ. „Iskra“ u. Kazanlâk (12. IV. 1974): informo de T. Ivanov pri la festo de la Esperanta revolucia poezio kaj kanto, okazinta la 6—7-an de aprilo 1974 en la sama urbo.

En la semajna popularscienca gazeto „Orbita“ (4. V. 1974): artikolo „Kio nova en Esperanto?“ — pri la vorttrezoro de la Internacia Lingvo surbaze de „Plena Ilustrita Vortaro“.

En ĵ. „Oteĉestven Zov“ — u. Vraca, (10. V. 1974) aperis la kutima monata priesperanta rubriko. Sub titolo „Sukcesoj de la plej mal-

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka ĤRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI.

Administra sekretario: Minko CONKOVSKI

Teknika aranĝanto: Prodan PRODANOV

Korektis: Vasja PETROVA

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

DEZIRAS KORESPONDI

grandaj esperantistoj* Enjo Daskalov — E-instruisto, rakontas pri la sperto de Esperanto-instruado al infanoj en antaŭlerneja aĝo. Tio estas unika provo en la lando kaj la rezultoj — kuraĝigaj. Sub la gvido de sia instruistino la infanoj jam plenumas belartan Esperantlingvan programon. Krome, en la rubriko: informo pri la libro de la ukraina verkistino Nadia Andrianova pri la rusa esperantisto-blindulo V. Eroŝenko, pri la monumento de Zamenhof en Brazilo, Esperanto en la Olimpikaj ludoj en Kanado ktp.

En la vespera eldono de j. „Oteĉestven Front“, Sofio (13. V. 1974) — detala informo pri la plenkunsido de CK de BEA, okazinta la saman tagon. La plenkunsido pritraktis la problemojn pri la plialtigo de la idea, teoria kaj kultur-kleriga agado de la bulgaraj esperantistoj.

La sekvan tagon pri la plenkunsido informis ankaŭ la ĵurnaloj „**Rabotniĉesko Delo**“ kaj „**Zemedelsko Zname**“.

En j. „**Rabotniĉesko Delo**“ (26. V. 1974): Informo pri la spektaklo de B. Beleva, An. Anev kaj M. Ĉobanov — artistoj de la Bulgara Esperanto Teatro, dum la kongreso de IFEF en Taragona (Hispanio).

En la semajna gazeto „**Pogled**“ (3. VI. 1974): artikolo „Ĉu vi konas Esperanton?“ pri la vortriĉeco de la Internacia Lingvo surbaze de la „Plena Ilustrita Vortaro“.

En j. „**Pravna Trubuna**“ (14. V. 1974): informo pri sukcese finiĝintaj Esperanto-kursoj en la Justicialaco — Sofio, organizitaj de la Esperantista Sekcio „Justeco“ ĉe la Asocio de Juristoj en Bulgario.

En la semajna gazeto „**Literaturen Front**“ (6. VI. 1974): artikolo de Nikola Aleksiev pri la literatura heredaĵo de la publicisto-esperantisto Trifon Hristovski.

En j. „**Rodopski Ustrem**“ — u. Smoljan (11. VI. 1974): detala informo pri la agado de la esperantistoj en la distrikto de Smoljan lige kun la distrikta E-Konferenco en majo ĉi-jare.

En j. „**Zarja na Komunizma**“ u. Loveĉ (13. VI. 1974): informo de Ilija Ivanov pri renkontiĝo de la esperantistoj el Loveĉ-distrikto, dediĉita al 30-jara jubileo de la socialisma revolucio en nia lando.

En j. „**Trojanski Glas**“ (19. VI. 1974) aperis raportajo pri la recitalo de la Esperantaj kanto kaj poezio en v. Borima de Dobri Danov.

En j. „**Oteĉestven Zov**“ — Vraca (21. VI. 1974) en la konstanta Esperanto-rubriko aperis artikolo de Kamelia Konova, lernantino en gimnazio „Hr. Botev“, sub titolo „Plena harmonio“ — pri la diversflanka agado de la lernejana Esperanto-Societo „Verda Raketo“ en la sama gimnazio.

Bulgario

Petrana Ĉeĉeva — zavod „Balkan“, Loveĉ (30-jara — kun ĉi pri ĉi).

Najden Petkov — Loveĉ, bloko 206, vh. „G“ II et. (32-jara kun ĉi pri ĉi).

D-ro Colova — Loveĉ, zavod „Balkan“ (26-jara — kun ĉi pri ĉi).

Vârbinka Atanasova — Loveĉ, str. Vasil Kolarov, „Ŝapkarska industria“ (kun ĉi pri ĉi).

Hristina Mladenova — Sofio 3 (16-jara lernantino), str. Ŝar planina № 60.

Studenta Interklubo „Juna Pacdefendanto“, deziras korespondi kolektive pri pacpolitikaj, kulturaj kaj filologiaj problemoj en la lingvoj Esperanto, rusa, franca, germana kaj angla.

Adreso: Bulgario, Ŝumen, Supera Pedagogia Instituto, Komsomolo (per Studenta Interklubo „Juna Pacdefendanto“).

Dobri Hristov — str. „Vitiniĵa“ 32, Sofio 17 (kun ĉi pri ĉi).

Petr Rangelov — blok 97, str. 619, Sofio 17 (kun ĉi pri ĉi).

Hispanio

40 geknaboj kaj fraŭlinoj, tre lertaj lernantoj, dez. korespondi kun la tuta mondo. Bonvolu skribi al ilia instruisto:

Rudolfo Canet, str. Quintana, 12—13, Ali-cante (Hispanujo)

Hungario

Jenő Zseller, H-4952 Nagyszekeŝes, Toldi u. 2 (25-jara — pri ĉi kun ĉi).

Pollando

Grazyna Sierakowska — ul. Staffa 2, m. 10, Lodz (16-jara — kun geknaboj, interŝanĝas bk). Aleksandra Strawinjska — 10—437 Ōlsztyn, str. Dworcowa 23/33 (kun gebulgaroj — turismo, bk, pm, suveniroj, ankaŭ reciproka gastado).

Halina Piela — ul. Nowa Wies 27, 37—200, Przeworsk (16-jara lernantino — kanzonoj, filatelo, aŭtomobiloj).

Wronska Jolanta — 93—249 Lodz, ul. Gojawiczynskiej 1 m 25, bl. 328 (16-jara — kun gebulgaroj, pri literaturo, bk).

Sovetunio

Studentoj de medicino dez. korespondi pri medicinaj temoj, gazetoj k. s. kun ĉiuj landoj. Skribu al adreso:

Esperanto-rondo, Medicina Instituto, 253 003 Kiev, USSR.